



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
 Redaktejo : Esperanto * Cargue Sac, F 47470 BEAUVILLE
 Unu n-ro : 8 FF. Abono por 1990 : 40 FF ĝirotaj al :
CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS, pĉk 3371 74M Bordeaux
 (mencii same sur bankĉekoj, dankon!)

FULARDO KAJ PRINCIPOJ

Sendepende de la aparteneco al politika partio aŭ al filozofia doktrino, la franca publika opinio estas nun dividata pri neantaŭvidita afero. Kelkaj muzulmanaj liceaninoj iras al la lernejo kun fulardo blanka aŭ kolora, kiu, simile al la nigra "ĉador" trudita de Ĥomejni al la iranaj virinoj, kaŝas iliajn harojn. La demando estas : ĉu, en la nomo de la laika (senreligia) instruado, oni devas malpermesi la fulardon ? Ĉu, en la nomo de la individua libereco, oni permesu ĝin ?

Unu liceestro adoptis la unuan respondon, sed la ministro decidis por la dua. Sendube estis precedenco. En la tempo, kiam la katolikaj klerikoj ancorau ne prenis al si civilajn vestojn, oni povis vidi sur la benkoj de niaj fakultatoj junajn pastrojn en sutano kaj junajn monaĥinojn en longa robo, kun kruco sur la brusto kaj blanka amelita kufo, kiu kaŝis iliajn harojn. Tiam neniu protestis.

Sed nun la afero estas alia. Tiu simpla fulardo estas

manifestacia simbolo de tiu ŝijaista sekto, kiu, minoritata en islamo, estas aparte maltolerema kaj agresema. Kio garantias, ke tiuj knabinoj, fieraj de sia venko, ne persekutos, almenaŭ per morala premo, siajn samreligiajn kunlernantinojn, kiuj rifuzos la fulardon? Kaj en tia okazo, kiel oni povos konstati la premon, kaj ĝin kontraŭi?

Sendube multaj alilandanoj, kiuj kutimas vidi religian entrudiĝon en la publikaj lernejoj, ne komprenos la reagon de nia popolo. Sed por ni, francianoj, senperaj heredantoj de la franca revolucio, staras malfacile solvenda demando. La revolucio proklamis du fundamentajn principojn, nome individuan liberecon kaj laikecon de la instruado. Ĝis nun tiuj du principoj pace kunekzistis. Subite, pro la islama fulardo, ili troviĝas interkontraŭaj.

Kiu inventos akcepteblan kompromison? Aŭ kiu ĉerpos el tiuj tezo kaj antitezo kontentigan sintezon?

VALO

lan de novembro 1989

Al ĉiuj geamikoj, kiuj esprimis simpatian kaj zorgojn pri mia akcidento, mi volas nun anonci bonan novaĵon: post radiografia kontrolo la kirurgo permesas al mi stari sur ambaŭ piedoj, tre progresive dum du aŭ tri semajnoj. Poste, esperinde, mi povos marŝi - malfacile, mallerte, malrapide, sed tio estos nova paŝo sur la longa vojo al resaniĝo. Ĉu tiu resaniĝo iam estos kompleta, ĉu nur relativa? Ni vidos, ni ne provu antaŭvidi: al ĉiu tago sufiĉu ĝia peno kaj ĝia zorgo.

Valo.

- la venonta numero aperos fine de januaro 1990 -

La afabla abonanto bonvolu do jam konsulti la indikojn troviĝantajn lastpaĝe por kontroli, ĉu lia/ŝia abono ne finiĝis, ĉu lia/ŝia BS:L:-konto povos plu elteni, aŭ ĉu necesas... ion fari.

Se li/ŝi opinias inda simbolan subtenon al AERA per membriĝo, li povas kotizi al ĝi per 20 kromaj frankoj. Antaŭdankojn!

La malafablan abonanton ni tamen kise dankas pro lia/ŝia ĝisnuna pacienco.

Kribo



Ĉu simpli aŭ multmalfaciligadi E-o(n)?

En L! 83 (julio-aŭgusto 89) aperis samtitola artikolo. Ĝi levis mian atenton kaj mi trovis ĝin interesa kaj pensveka; pro tio mi ĉi-sube donos kelkajn miajn pripensojn punkton post punkto laŭ la problemoj alvokitaj.

1-a demando : Ĉu ni forigu finaĵojn AJ, AJN, OJ, OJN, lasante nur "O" kaj "A", kio, laŭ la aŭtoro, efikus por rompi la monotonecon de la Esperantaj finaĵoj? ZAMENHOF sentis tion, kaj pro tio (ne nur pro tio) li metis akcenton sur la antaŭlastan silabon, kio estas kvazaŭ solvo; cetere, mi dubas, ĉu, se restus nur finaĵoj O kaj A, la lingvo estus malpli monotona, eĉ male... Prefere, oni ne povas diri, ke la adjektivo **ĉiam** akompanas la substantivon; ni memoru nur tion el "la Espero":

"Ne al glavo sangon soifanta

ĝi la homan tiras familion..."

Tio estas bela ekzemplo de elartikigo de la frazo, ĉu ne? Mi tamen devas diri, ke mi ne fanatikas por tiaj formoj.

2-a demando : ĉu forigo de la akuzativo? Fakte, en "LINGVAJ RESPONDOJ", Zamenhof montriĝis tre tolerema rilate al la akuzativo, sed ni devas konscii, ke tiutempe ĉiuj estis komencantoj, kaj neniu aŭ preskaŭ neniu krom Z. mem havis lingvo-senton. Memkompreneble do, ke Z. havis la saman sintenon, kiun ni nun havas antaŭ komencantoj: ni skrupulus korekti ties akuzativon, nur se povus okazi miskompreno pro tio, sed nun cent jaroj pasis kaj ekzistas homoj, eble ne la plimulto ankoraŭ, tamen, kiuj havas tiun lingvo-senton kaj ne komprenus aŭ pli ĝuste, kies oreloj ŝokiĝus, se oni alparolus ilin kiel la aŭtoro proponas.

La ideo forigi la akuzativon kaj eĉ la adjektivan finaĵon venas de la angla lingvo, en kiu oni tre ofte formale

ne distingas la adjektivon de la substantivo, de la adverbo, eĉ kelkafoje de la verbo. Tio estas ebla, sen miskompreno, pruvo nediskutebla estas, ke la angla estas plena kaj tre disvastiĝinta lingvo. Povas esti, ke Z. pripensis pri tiu ebleco por la lingvo internacia, sed la konsekvenco estus kiel en la angla, ke la frazo estus absolute rigida kaj tute nefleksebla. Pro tio, Z. forlasis tiun simpligon favore al la fleksebleco de la lingvo, kaj ankaŭ al ĝia precizeco, kiu ebligas distingi por japano kiel por germano en la sekvaj ekzemploj:

La ĵurio juĝis la homon kulpan
ĉar la homon oni jam pruvis kulpa, kaj la ĵurio kondamnis
lin pro lia pruvida kulpeco je prizono, ktp, ktp...

La ĵurio juĝis la homon kulpa
Sed eble, la homo ne efektive kulpis, estis kontraŭdiroj,
kulpo-probableco, sed ne certeco, la ĵurio opiniis la probablecon sufiĉa...

Tiuj du formoj ebligas ioman ŝanĝiĝon de la rilato inter la adjektivo kaj la substantivo al kiu ĝi rilatas, ĉu senpere, ĉu pere de la verbo.

3-a demando : La problemo pri IG kaj IĜ

La demando estas ligita al "transitiveco" aŭ "netransitiveco" de la verboj. Kiam verbo estas "transitiva" aŭ "transira", la ago pasas de subjekto al objekto, ĉu rekte, akuzative, ĉu nerekte, prepozicie (P.I.V.). Kiam verbo estas "netransitiva" ne netransira, la ago koncernas nur la subjekton, kaj la verbo povas havi post si nur adjekton aŭ predikativon, sed ne objekton (P.I.V.). La difinoj estas simplaj, sed la praktiko estas tute aliaspekta, kaj fakte, kiam mi skribas artikolon aŭ eĉ kelkafoje leteron, mi devas kontroli ĉu la de mi uzataj verboj estas TR aŭ NETR!...

Post agnosko, ke transitiveco aŭ netransitiveco estas TRE grava malfacilo de Esperanto, Bernard GOLDEN en la revuo "ESPERANTO" (n°995 de 1988a, paĝo 188a kaj s.) kaj Alan TOWSEY ankaŭ en "ESPERANTO" (n°999 de 1989a, paĝo 54a) konstatas, ke eĉ transitiveco ne ĉiam estas klara nek konstanta. Ĉiu konas la ekzemplon :

"Li batas sian azenon" TR

"Ho, mia kor', ne batu maltrankvile" NETR
kaj estas multaj aliaj ekzemploj kiel

blovi (tr & netr), afekti (same), penetri (same), pensi, kredi, fumi, veti... La elekto de kategorio varias laŭ la vortaristoj kiel montras TOWSEY, sed plie, ĝi ŝajnas tute hazarda kaj ne homogena; kial ne samkategorias verboj najbarsencaj kiel diri (TR), paroli (NTR), fari (TR) kaj agi (NTR), polemiki (NTR) kaj agiti (TR), fini (TR) kaj ĉesi (NTR), komenci (TR) kaj eki (NTR), ankaŭ debuti (NTR), konservi (TR) kaj daŭri (NTR); marŝi (NTR) kaj movi (TR), murdi (TR) kaj krimi (NTR), dolori (TR) kaj peni (NTR), utili (NTR) kaj uzi (TR), ŝanĝi (TR) kaj vari (NTR)...

La du cititaj aŭtoroj sin demandas ĉu, kiam ne povas esti miskompreno, oni povus laŭ la principo de neceso kaj sufiĉo forlasi plej ofte la sufiksojn IGI kaj IĜI kiel cetere estas en multaj lingvoj, kie oni ne formale distingas la du funkciojn trans. kaj netrans. Tio estus verŝajne kontraŭa al la uzado de Esperanto kiel pera lingvo por komputiloj, sed por tiu uzado mi aŭdis, ke oni devis fari jam kelkajn ŝanĝojn en la lingvo, sintakse. La sufiksoj IG kaj IĜ estas tamen ne malhaveblaj almenaŭ por du uzoj (eble pli): 1) IG por pure faktitivaj verboj, tio estas kiam temas pri ago trudita de la subjekto al iu alia, kiu plenumu ĝin 2) IĜ por transira stato. Ekzemploj : "Jean-Loup SULITZER verkigas siajn romanojn per anonimuloj" (la pera vorto estas la vera aganto, sed ni dirus "li daŭras siajn taskojn" La razenoj verdas en printempo (estas verdaj), sed flaviĝas en aŭtuno.

Ankaŭ mi kredas ke oni devos ĉesi uzi IĜ anstataŭ la pasivan formon, formo kiel "la pordo fermiĝas" tolereblas anstataŭ fermatas ĉar la pordo transiras de stato de malfermiteco al fermiteco, sed mi ne vidas kial oni dirus "la libro legiĝas" anstataŭ "la libro legatas", kiu estas multe pli logika kvankam malpli uzata, sed Esperanto estas logika lingvo, ĉu ne? Plie, se oni kuraĝas diri: "Li krimis al knabino, sed li ne murdis ŝin" (en kazo de seksperforto), laŭ la regulo 14a, kiu ellasas, ke prepozicion oni povas anstataŭigi per akuzativo kiam ne povos okazi miskompreno, oni rajtos diri: "Li krimis knabinon, sed li ne murdis ŝin".

Oni devos multe pripensi kaj ekzercadi pri tiuj ŝanĝoj,

nur daŭra eksperimento donos konkludon, ĉu ellasebla, ĉu dezirebla?

1a ekstra rimarko : pri "permesi"

Tiu rimarko kaj la sekva ne venas de la Laŭte-a artikolo, sed de multaj legadoj, kiuj hirtigis min ĉiufoje kiam mi renkontis la uzon de permesi kun la senco ebligita. (jen vorto, kie IG estas necesa, ĉu ne?)

Se mi ne eraras, permesi signifas "doni permeson". d: erlaŭben. Ebligita signifas fari ke "io estu ebla". La signifo ne estas la sama, laŭ mi, ĉu mi pravus? Oni miksis la du signifojn sub influo de la etnaj lingvoj, speciale de la franca. Ekzemple, en la revuo ESPERANTO 994a numero, paĝo 166, oni legas: "la tuttaga ekskurso permesis al ni refreŝiĝi" (neniu nenio donis permeson, ĉu ĉeĉo, ĉu leĝo). En n°117a, p.45 de LITERATURA FOIRO, oni legas: "Lia, preskaŭ telegrama priskribo de la mondo permesas al mi malkovri tiujn valorojn..." Ĉu priskribo povas ion "permesi"? Tiujn, laŭ mi, erarojn oni trovas ĉiutage en ĉiuj E-gazetoj, tiel infektitaj ni estas de la franca. (Mi tre ŝatas la francan, sed ne en Esperanto...)

2a ekstra rimarko : pri "kun sia"

Eminentuloj asertas, ke la grupo "kun sia" estas nedisigebla, laŭ la modelo de Zamenhof: "Ŝi vidis la reĝon kun sia krono". Tio instigis Raymond SCHWARTZ rakonti, ke estis reĝo kaj kronprinco, kiu ĉiu posedis propran kronon, kun la konsekvenco ke iun tagon, la hastanta reĝo kaptis sur la kameno kronon, kiun li metis surkapen; venis poste la kronprinco, kiu timis ke la reĝo eraris pri la krono. Li ankaŭ hastis al la tronsalono kaj kion li vidis? Li vidis la reĝon kun sia krono. Restas la demando ĝis hodiaŭ nesolvebla de la "blokistoj": kies kronon havis la reĝo?

Se ni ne konsentas pri la "blokad-teorio", ni simple apliku la 3 regulojn de SIA :

- 1) tria persono de la konjugacio
- 2) pozicio en komplemento
- 3) resendo al la subjekto.

Tiam oni havas "La kronprinco vidis la reĝon kun sia krono" (tiu de la kronprinco)

"La kronprinco vidis la reĝon kun lia krono" (tiu de la reĝo : mankas la tria regulo)

Se oni anstataŭigus "KUN" per "KAJ", kio preskaŭ ne ŝanĝas la signifon, oni certe ne hezitus : la kronprinco vidis la reĝon kaj sian kronon (de la KP)

la kronprinco vidis la reĝon kaj lian kronon (de la R.)

J. MANCEAU

P.N. Se oni donas 1 punkton por ĉiu plenumita kondiĉo kaj 0 por ĉiu mankanta, oni rajtas uzi la refleksivon SIA, nur se la produkto de la 3 valoroj estas 1 (Sufiĉas, ke unu mankas, por ke la produkto estu $0 : 1 \times 1 \times 0 = 0$
 $1 \times 1 \times 1 = 1$)

Jam oni limigis la uzon de kelkaj afiksoj kiel "ad", "ec", "aĵ" al kazoj kiam ili estas nepre necesaj ; oni diras senplie : "li marŝis la tutan tagon" ~~ad~~

"Li admiris ŝian belon" ~~ee~~

"Li faris bonon" ~~aĵ~~

sed oni plu diras "Insista broso necesas por havi vestojn puraj", "Mi manĝis kokiĉaĵon"

.....
Ĉu monotona ?

(Vd. artikolon de Rejal en L:83 kaj respondojn en L:84)

Miaopinie, la monotoneco aŭ nemonotoneco de esperanta parolanto dependas de la parolanto, kiel prave rimarkis E.T. Grimley Evans kaj André Gilles.

Mi konstatis, ke kiam mi provas iom longe paroli, la aŭskultantoj enuas. Iu diskrete oscedas, alia interrompas min, ne por diskuti aprobe aŭ malaprobe, sed por paroli pri io alia ol mia temo, kiu interesis neniun. Evidente mi ne posedas retorikan talenton : mia parolo estas senkolora, senreliefa - monotona.

Male, kiam mi aŭdis paroladojn de Edmond Privat, de Raymond Schwartz, de Andreo Ĉe, de Lanti aŭ de Ivo Lapenna, neniam mi ricevis impreson de monotoneco. Ĉu tial, ke ili diferencigis la vokalojn akcentatajn aŭ ne

akcentatajn (sed kiel?)*. Sed certe tial, ke ili metis en sia parolo konvinkan forton, kiun ili havis en si kaj komunikis al la ĉeestantoj.

Same en la preskaŭ senakcenta franca lingvo, kiam mi aŭdis oratorojn kiel Sébastien Faure, Henry-Marx, pastro Viollet, Han Ryner, Raymond Duncan aŭ advokato Henry Torrès.

Mi do konkludas kiel Grimley-Evans kaj Gilles, ke la kvalito de la parolo ne dependas de gramatikaj apartaĵoj, sed de la persono de la parolanto. Ni konservu nian fundamentan esperanton, kaj se ni scipovos elokvente uzi ĝin, ni ne tedos la aŭskultantojn.

VALO

*) Necesus havi modelojn sur disko aŭ bendo.

RESPONDO AL K-DO REJAL

Esperanto estas kreita kaj lernata por servi kiel klara kaj fidinda interkomprenilo internacia, interetna. Ĝia funkcio ne estas artaĵo, kvankam ĝin kreis artisma kaj genia persono, kaj kvankam per ĝi oni povas krei artaĵojn. Se en si mem ĝi estas artaĵo, tio ne estas neceso por per ĝi krei beletristikon: etnaj lingvoj ne estas artaĵoj, ili estas kreskintaĵoj, kaj tamen kreas poezion. Do beletristiko havas nenion rektan rilaton al eventuala arteco de Esperanto, al la artismo per kio ĝi kreas.

Kiam temas pri la karaktero de Esperanto, ni povas diri ke ĝiaj avantaĝaj ecoj estas ĝiaj sencklareco, pursoneco, noci-(esprim-)vasteco, gramatika fidebleco kaj ĝusta vortlongeco (tre grava, sed senkonscie solvita, ankaŭ en etnaj lingvoj). La uzebleco kaj karaktero de ĉiuj iloj estas limigitaj kaj la necesaj malavantaĝoj de Esperanto estas la eŭropeco de ĝiaj vortoj (ne de ĝia strukturo), la ofteco de afiksoj (sed, apenaŭ rimarkita, tio preskaŭ sammulte okazas en multaj lingvoj), la severa obeendeco de ĝiaj gramatikaj (= strukturaj) reguloj (logikeco) kaj la fakto ke en ĝia vortkreado ĝi devas uzi kelkegfoje longajn kombinitajn vortojn kaj kelketfoje du aŭ tri vortojn kie en iu aŭ alia lingvo oni uzas plurajn simplajn vortojn por diversaj aspektoj de tio,

kio en aliaj lingvoj konsideriĝas kiel unusenca (ekz. la tri diversaj vortoj en la malaja lingvo por la, gravaj por ĝiaj parolantoj, tri aspektoj de "rizo").

Escepte de novaj vortoj por nur parto el la novaj trovaĵoj kaj inventaĵoj, plejparte teknikaj aŭ sciencaj nocioj, Esperanto bezonas nek neologismojn nek esceptojn al aŭ ŝanĝiĝojn de gramatikaj reguloj. Ĝi fariĝus simila al la etnaj lingvoj kiuj, speciale la angla, okulfrapas pro miskompreniga sencmalklareco kaj por nefidebleco kaj lernmulteco.

Kaj kio pri la poetoj? Ili, se artistoj grandaj, kapablos fari artaĵojn per tiu limigita rimedo, same kiel pentristoj, skulptistoj kaj muzikistoj (kaj la etnaj poetoj) faras artaĵojn per siaj limigitaj rimedoj. Esperanto ne estas kreita precipe por la poetoj, sed precipe por la klara kaj fidinda interkomprenado inter la popoloj. Kaj se tio signifas ke la poetoj estas pli limigitaj ol ili deziras, tio estos instigo al ili por fariĝi pli grandaj artistoj kaj por tamen krei belon, same kiel certaj afrikaj kaj aŭstraliaj pentristoj kreas artaĵojn per nur kelkaj haveblaj koloroj. "Ju pli tre forta la ŝtonrezisto, des pli senmorta la artskulptisto."

Kaj nun pri la artikolo de k-do Rejal. Ŝajnas al mi, ke li plendas pri du aspektoj de la zamenhofa Esperanto: 1-e, ke okazas "malbela" lingvouzo pro necesa ofteco de certaj sonoj (precipe afiksoj) kaj 2-e, ke la gramatiko estas tro malfacila por lernantoj (kaj progresintoj?).

Koncerne la guston pri "malbeleco": la klasikgreka lingvo estas de konantoj laŭdata kiel belega lingvo ĝuste pro la ĉeesto de vortfinaj sonoj kiaj (krom ekz. -eŭs, -ajs, -ejs, -ojs, -oj, -a, -o) -aj, -an, -ajn, -on, -ojn, kaj k-do Rejal deziras senigi nin de tiu beleco en Esperanto, forĵetante la pluralan ĉe adjektivoj kaj, ĝenerale, la akuzativon ĉe adjektivoj kaj substantivoj (ĉu ankaŭ ĉe adverboj, dirante "al en" anstataŭ "en + ak."?). Li plendas pri la ofteco de certaj sonoj, sed li deziras monotonigi la lingvon plioftigante la finaĵon -a (anstataŭ -a kaj -aj kaj -an kaj -ajn) kaj la finaĵojn -o kaj -oj (anstataŭ -on kaj -ojn). Li volas malpliigi la necese fortajn (kaj belajn, ĉu ne?) sonojn -ig kaj -iĝ, dum jam Zamenhof mem faris tion, intuicie, por ni

forlasante la -ig ĉe la mediala voĉo de verbigitaj adjektivoj ("moliĝi" el la logika "moliĝiĝi", ĉar mediala voĉo eblas nur el (transitiva) verbo). K-do Rejal evidente ne komprenas, ke la nociiga funkcio de -ig kaj de -iĝ ne estas transitivigi aŭ maltransitivigi verbojn (tio estas nur flanka rezulto de la signifoj de tiuj sufiksoj), sed ke ili havas specialan signifon, nome ke -igi = faktitivo, = io aŭ iu agas tiel ke io aŭ iu alia faru iun (transitivan aŭ netr.) agon, kaj ke -iĝi = medialo, = io aŭ iu pasive faras (= ricevas) agon sen ke oni scias aŭ vidas aŭ esprimas ke, aŭ kiu, estas faranto de tiu ago (do povas okazi nur post transitivaj verboj). Same k-do Rejal eble ne scias ke "vortaro" estas "aro de vortoj", sed pli ol tio, kaj io pli preciza (same kiel "vagonaro" ne estas nur "aro de vagonoj" kaj "lernejo" ne estas simple "iu loko por lerni", sed speciala loko por lerni). Cetere "vortlibro" estas libro konsistanta el vortoj, kontraŭa al "bildlibro".

Estas vere, ke pro la simpla lingvouzo en televido kaj aliaj enmensigiloj, kaŭzanta malriĉan ideotrezoron ĉe la homoj, multaj lernantoj de Esperanto (kaj de io ajn) postulas "simplan", nebulan, malprecizan, nuancmalriĉan lingvon. Sed ĉu ni, Esperantistoj, devas helpi tiun mensmalriĉigan tendencon, tre utilan cetere por registoj kaj vendistoj por manipuli niajn pensojn? Kaj la nuancriĉecon Esperanto kreas precipe per sia logika, senescepta kaj preciza regularo gramatika kaj vortfarada. Tial ni konservu ĝin tia.

La akordo de la adjektivoj havas la celon eviti miskomprenojn (unu el la precipaj celoj de Esperanto!). K-do Rejal ne vidas ke eĉ en la angla lingvo oni sentas tiun neceson, kiel en "the white one" ("la blanka (unu)") kaj "the white ones" ("la blankaj (unu)") kaj en la adjektivaj "this, these, that, those" (kaj eĉ en la verbo: "the sheep runs away" kaj "the sheep run away", "the fish swims" kaj "the fish swim", ktp). Pri la akuzativo: ankaŭ ĝin necesigas la komprenklareco. Kaj krome se ni ĉe ĉiu rekta komplemento devus halti kaj nin demandi "ĉu miskompreno eblas sen akuzativo?" tio estus pli peza ŝarĝo kaj ne ĉiam nek de ĉiuj solvebla (ekz. * "la malgranda

fenestro la maljuna virino vidigis" kaj * "la direkto de la milito la fama poeto ŝanĝis"). La diraĵo de Teofil Cart (ke gramatika korektaĵo estas malbona se ne klara) aŭ havas la celon ke ni evitu komplikajn vortkombinaĵojn kaj, gramatike ĝustajn, strukturordaĵojn, aŭ ĝi estas sensencaĵo ĉar la gramatiko celas pliklarigi la bildon kaj simpla sed persista aplikado de la gramatikaj reguloj ne povas ne doni klarecon. Kaj la neutila uzo de genroj en la franca lingvo havas neniun rilaton al la utila uzo de pluralo kaj akuzativo en Esperanto. Estas ĝuste la fidebleco kaj precizeco de la Esperantaj gramatiko kaj vortfarado kiuj povigas ĝin esprimi multajn nuancojn, ne nebule dependante de la signifoj de la kunteksto, kiu lasta karaktero ŝanĝis la anglosaksan lingvon en la tiom malprecizan kaj nefidindan anglan lingvon, kaj fine en la neuzeblan Basic English.

Fine: kial k-do Rejal deziras apliki sian "plibono estas malamiko de bono" diskriminacie nur al Esperanto dum li certe kaj feliĉe ne aplikus tion al la aliaj gravaj homaj okupoj, kiel sanigmetodoj kaj artesprimoj? "Plibono" estas la devizo de la naturo kaj de la idealistoj kaj estu la devizo de ĉiuj homoj.

Marcelo Leereveld

Progreso estas evoluo

Ni ne tro gratulu kaj danku al Kribo pro la necenzurado en "Laŭte". Tio permesas vastan komparadon de spertoj kaj ideoj, kritikojn, liberajn diskutojn. La tuto donas al ia revuo viglecon, vivforton, kaj kreas simpatian etoson. Post tiu diro, la fakto estas, ke iaj demandoj kiel tiuj de Oksana kaj aliaj postulus broŝurojn, eĉ librojn por esti ĝisfunde pritraktataj. Tio superas la eldonkapablon de Kribo, spite lian senĉesan kaj bonvolan laborkapablon. Usonaj, internaciaj gazetoj kiel "Newsweek" havas almenaŭ tri eldonojn: unu por Usono, unu por Eŭropo, unu por Pacifika mondo, pli ol centon da gazetistoj, fotistojn, ktp. Ni ne atingas tiun punkton en Esperantio.

Unue mi respondas al diversaj punktoj de: "Kio estas

progreso?" Jes, ja estas eraro pri la naskiĝdato de Nabokov, estas 1899 ne 1890. Kiu eraris mi ne scias, sur mia malneto estas skribita 1899. Eble sur la kopio sendita al Kribo mi mem erartajpis, aŭ Kribo erartajpis, mi ne scias.

Pri fremdlingvoj kaj la kapablo pensi en ili, mi devas diri, ke mi ekstudis la anglan antaŭ 50 jaroj, ĵus post Esperanto kaj legas ĝin flue de ĉirkaŭ 40 jaroj. Mi tre ofte legas kaj studas anglalingve, mi legas plurajn centojn da paĝoj jare. Lingvo estas ĉefe afero de praktiko.

Lanti-n mi ne konis persone, li jam estis for el Eŭropo, kiam mi ekkonis SAT. Lanti ŝajnas al mi ne sanktulo sed ekstara racia homo. Li ne estis la sola kreanto de SAT; en la kongreso de Prago estis 80 partoprenantoj, i.a. Bannier kaj Glodo, kiujn mi bone konis. Mi legis, mi ne dirus ĉiujn publikaĵojn de Lanti, sed almenaŭ la ĉefajn kaj mi konstatis, ke li pravis preskaŭ ĉiame. Ekzemple, kiam li riproĉis al Stalin lian naciistan politikon. Stalin favoris naciajn lingvojn, ne Esperanton. La rusa lingvo anstataŭis Esperanton interne de Sovetio. La landlimoj estis striktaj kaj oni ne rajtis vojaĝi nek labori ekstere de la loka ŝtato sen pasporto kaj permeso. Konsekvence, la popoloj ne povis interfratiĝi kaj ili estis apartigitaj per lingvoj kaj landlimoj. En Usono oni ne bezonas pasporton kaj vizon por iri de Novjorko al Kalifornio, aŭ Florido, estas tute libere. Tamen Sovetio estas imperio, imperio heredita de la Caroj, kiuj konstruis ĝin tra jarcentoj. Tio ebligis al tiu lando venki Germanion. Se estus tiamizolitaj landoj, estus ludo por Germanio konkeri Ukrainion kaj ripozi, kaj antaŭenmarŝi. Sovetio ne havus malantaŭajn bazojn, se ĝi konsistus el sendependaj landoj. Tiu imperio kostis ankaŭ multe da sango; post ĝia eventuala detruo estus ege malfacile rekonstrui ĝin. Vidu: la eŭropaj nacioj ne sukcesas unuigi. La Eŭropaj Unuigitaj Ŝtatoj ne estas por morgaŭ.

Kiam Lanti opoziciis al kreo de Izraelio antaŭmilito, li predikis en dezerto (Leteroj de E. Lanti, Parizo 1940, p.215, letero 51-a el Sidnejo la 7.1.1938?). Sed nun vidu la situacion en Izraelio : bataloj senfinaj kun la Araboj. Spite

ĉiujn simpatiojn, kiujn ni povas havi por tiu lando kaj la mirindan laboron faritan de la Izraelianoj, ili ĉiam riskas esti forpuŝataj de la Araboj, kies fanatikeco estas neneg-ebla. En Okcidento, en Usono, tiu popolo kunfandiĝas kun la aliaj loĝantoj tute simple, tiel ŝparante senfinajn militojn, strebojn, monon.

Naciismo estas tute absurda, ĝi estas kun religioj la fonto, la motivo de ĉiuj militoj. La nura solvo estas integriĝo, libera kunfandiĝo de popoloj, kiel en Brazilio, Reŭnio, ktp. (U.S.A. is melting post : Usono estas fandujo). Vian entuziasmon por malgrandaj nacioj mi tute ne komprenas. Ni estas en 1989, jam de pli ol 40 jaroj ekzistas atombomboj, kiuj malpermesas mondmiliton. Ĉar atom-milito signifus finon de la homaro, do milito ne plu havus celon. Ni neniam devas forgesi, ke milito estas homa afero, volata, preparata, organizata, kaj se tio signifus finon de la homaro, tio ne plu havus celon. Ni, pacistoj, devas konsideri, ke ekzistas homoj, kiuj sopiras al milito por la plezuro buĉi, aliaj sopiras nur al la profitoj, kiujn ili povas eltiri el milito aŭ dum paco, ne gravas. Pro tio estas militoj, ne por la bonfarto de la popoloj. Do ne plu eblas okazigi mondmiliton, kiu preterpasus siajn celojn, sed milito per klasikaj armiloj eblas inter malgrandaj nacioj. Ekzemploj ne mankas tra la tuta mondo : Ulstero, Libanio, Izraelio, Afganlando, Cejlono... Tiuj militoj en Libanio, Afganlando... kiu pagas la armilojn? Certe ne la loĝantoj, kiuj estas ruinigitaj de longa tempo. Do estas vi, mi, la civitanoj el Eŭropo, Usono, Sovetio, ktp... Ja vere, nepre necesas etnacioj kaj protekto de etnaj kulturoj, lingvoj, ktp... kiuj estas verdire protokulturoj, protolingvoj. Morgaŭ, se Sovetio displitiĝus, estus militoj, kiuj nepre okazus. Vidu jam Armenion kaj Azerbajĝanion, kia plezuro por la militoifantoj kaj la armilvendistoj!

Kion mi ĵus diris, tio estis ĝenerala, nun pri Sovetio. Pri tiu lando mi ne pretendas havi viajn konojn kaj spertojn, mi ne konas cent rusajn vortojn, mi neniam vizitis Sovetion. Ĉio, kion mi konas pri tiu lando, devenas de miaj legadoj kaj de kelkaj konversacioj kun Germanoj, kiuj iris tien kiel militkaptitoj aŭ deportitoj. Tamen estas

pli ol nenio. Kiam mi ekinteresiĝis pri politiko en 1938, la grandaj procesoj de Moskvo estis ĵusaj (1936) kaj en la Trockiista movado oni rakontis multon pri Stalin kaj Sovetio. Jam Lanti estis verkinta kun Ivon "Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio?". Al liaj okuloj de fakulo, meti-isto, saltis la maldiligenteco, la mallerteco de kamparanoj, laboristoj.

La entuziasmo por la revolucio, kiun mi havis en mia juneco, multe kvietiĝis pli malfrue. Prenu ekzemple la francan revolucion de 1789, kies ducent jarojn oni festas ĉi-jare. En la tiama epoko estis fiasko, kiu kostis 600 000 mortintojn*. De la plej famaj kiel Lavoisier (Lavuazje) kaj Condorcet (Kondorse), du scienculoj, S-ino Roland, elstara virino, Babeuf la socialisto, ĝis la multnombraj nekonoj, kiuj ne konsentis kun la tiranaj diktatoroj. Poste sekvis la militoj de la korsika ogro Napoleono, kiuj kaŭzis la morton de 900 000 homoj* kaj finfine estis reĝeca restarigo ĝis 1870. La metran sistemon oni aplikis 100 jarojn poste, la publika instruado en Francio datumas de 1882. Estas ni la pranepoj, kiuj profitas de la revolucio de 1789, sed niaj prapatroj rikoltis morton kaj suferojn.

Pri Sovetio, tre skeme. Antaŭ 1914 estis rusa imperio kun multe da malfruo kompare kun okcidentaj landoj. Verŝajne, mi ne scias, 60% el la popolo ne sciis eĉ legi. Poste okazas la milito, la revolucio, la kontraŭrevolucio (armeo Kolĉak kaj de aliancanoj). Kiom da mortintoj? Kiom da elmigrintoj? La lando estas ruinigita. Dudek jaroj pasas sub fera diktaturo de Stalin kaj kunuloj. Denove milito, kaj kia milito! Ĉirkaŭ 20 000 000 da mortintoj inter la Sovetianoj. Kaj denove Stalin kaj la sekvantoj. En tiaj kondiĉoj estus miraklo, se la lando estus atinginta la nivelon de Usono, kaj ĉiu scias, ke politikistoj ne faras miraklojn, male. Usono bezonis pli ol cent jarojn post sendependiĝo por fariĝi potenca lando. Spite ĉion ĉi la lando progresis, la popolo estas pli kaj pli instruata, sciencaj institutoj kaj industrioj disvolviĝas. Konsekvence, ankaŭ la politikistoj sekvas, okazas perestrojka kaj multe da reformoj. Iom post iom liberoj disvastiĝas. Bedaŭrinde,

estas ankoraŭ fiaskoj en ekonomio, nesufiĉa produktado, malbona distribuo de la varoj, malŝparado, troa burokratismo, ktp, vi scias tion pli bone ol mi. Tial Sovetio estas ankoraŭ tre malfrue malantaŭ Usono. Do mi ripetas mian demandon al vi, kiu ĝisfunde konas Sovetion : ĉu vi opinias ke estus oportuna momento kaj bona afero por Sovetio ĝia dissplitiĝo en multajn sendependajn landojn? Ĉar kiam la movado estas startigita, tiam la dissplitigo riskas fariĝi grandega. Vidu en Francio, malgranda lando, iuj dezirus, ke ĝi fariĝu ankoraŭ multe pli malgranda, ke oni restarigu lingvojn antikvajn, kiel la bretona kaj vaska... Kiacele? Ne estas unuigo, estas divido, apartigo.

Ŝajnas, ke vi ne estimas sciencojn kaj teknikojn je ilia valoro. Estas pro tio, ke Sovetio estas tre malfrua, ke la konstruado de Blankmara kanalo kaj aliaj sovetiaj entreprenoj kostis tiom da homaj vivoj. Nun oni fosas tunelon sub la markolo inter Francio kaj Britio, krom eble iaj maloftaj akcidentoj, ne estos mortintoj. Ĉion, kio konsistigas nian komforton, nian sanon (ni produktas sufiĉe da nutraĵo, ne plu estas malsato, nek plagoj, epidemioj, ktp) ni ŝuldas al sciencoj kaj teknikoj. Tiun temon mi povus disvolvi kvazaŭ senfine. Revolucio estas historio kaj oni ne povas reverki historion, sed progreso estas evoluo. Evoluo, kiu kreis la vivon, la homon, kaj kiu plu daŭras tra la evoluo de la homoj. Sen evoluo ni ne ekzistus. Ni estus restintaj kavernoj sen plua evoluo. Sed evoluo estas malrapida je homa skalo. La kaŭzo de la nuna krizo estas la abismo, kiu disigas sciencajn kaj teknikajn progresojn disde la malfruo de la politikistoj, sed vole-nevole evoluo efikos. Ankaŭ pri la temo disvolviĝo estus multo direnda.

Vi scias, ke nun ekonomie oni distingas kvar mondojn. La unua aŭ plej alta estas usona-okcidenta, la dua konsistas el Sovetio kaj kelkaj samnivelaj landoj. La tria, la plej konata kaj plej vasta, estas la plejmulto el la subevoluintaj landoj, parto el Afriko, ktp... La kvara mondo konsistas el la plej malriĉaj landoj kaj enhavas Ĉinion. Tiu klasifikado estas bazata sur la brutta nacia produktado/nombro da loĝantoj. Kompreneble, tiuj nombroj ne havas

absolutan valoron, sed ili estas bonaj indikiloj. Se tiu proporcio superas 10 000 US-dolarojn kiel en Francio, aŭ egalas ĉ. 250 US-dolarojn kiel en Ĉinio, estas granda diferenco, memkompreneble.

J. DEKER

*) F. Bluche, S. Rials et J. Tulard : La Révolution française. Que Sais-je? n°142, P.U.F. Paris 1989.

La prononco de la nomo "Zamenhof"

Rimarkigis al mi Valo, ke mia kutima prononco de la nomo "Zamenhof", kiun mi menciis en la lasta numero de L., estas malĝusta. Tio, kion mi devus esti sciinta, sed ne sciis, estas, ke la originala nacilingva formo de la nomo de la kreinto de nia lingvo estas "Samenhof", prononcita laŭ la germana maniero "Zàmenhof". Zamenhof ja ŝanĝis la skribmanieron de sia nomo, por ke esperantistoj prononcu ĝin ĝuste, sed bedaŭrinde la ŝanĝo havis ĝuste la inversan rezulton en mia kazo. Por mi nun restas nur la dilemo, ĉu mi korektu mian prononcon al "Zàmenhof" aŭ ĉu al "Zamenhof".

Amike via

Edmund T. Grimley Evans

P.S. : Enigmato por ne-lingvisto

Oni povas konstrui la kontraŭon laŭ du diversaj manieroj, aŭ per "ne-", aŭ per "mal-". Ofte la rezultoj havas similajn signifojn : ekzemple "malgranda" kaj "negranda". Kial do la vortoj "nehavigebla" kaj "malhavigebla" havas tiel malsimilajn signifojn?

Pri la libro

"Sennaciece tra la mondo"

Kvankam mi ne estas tre skribema, la legado de la artikolo de Gilbert Ledon en n°84 de Laŭte, titolita "Preter la faktoj kaj cenzuro en SAT" decidigis min al kelka reĝustigo. Estante PK-ano, mi ne povas senreage lasi k-don Peyraut ricevi sola la akuzon esti cenzuristo koncerne la libron cititan en la titolo. Pri tio mi sentas min kulpa, se oni povus paroli pri kulpo. Mi devas konfesi, ke mi estas persone je la origino de la afero.

Komisiita de la PK, mi estis la unua leganto de la manuskripto de Kdo Ledon. Tion mi faris kun multe da intereso. Tiuj vojaĝnotoj estas tre agrablaj. La stilo estas modela, ĉar vigla, simpla kaj klara.

Do ĉu bona libro tre konvena por iĝi SAT-eldonaĵo? Ho ve! Kelkaj frazoj, nur kelkaj frazoj ege tiklis min. Neeviteble tiuj frazoj devus provoki fortan reagon ĉe parto de nia membraro, ĉar malfacile akordigeblaj, tiel kun la titolo de la libro, kiel kun la celoj de SAT, ĉar ofendaj por iu kategorio de homoj.

Tion mi konfidis al la kromaj membroj de la P.K. Post studado de la libro ili unuanime samopiniis.

Ni decidis, ke estis necese peti de la aŭtoro aŭ ŝanĝi tiujn frazojn aŭ ne eldoni tiun libron sub la ŝildo de SAT.

Ĉu oni povas tie paroli pri cenzuro? Ni ja bone sciis, ke ĉiumaniere la libro aperos. Plie, ni neniam malkonsilis ties legadon.

HARDY

GASTIGADO DE ESPERANTISTOJ

La unuan fojon mi skribas al Laŭte okaze de "nia debato", kiun kutime mi atente legas. Temis pri la gastigado de Esperantistoj.

Ĝis nun mi pli gastigis ol mi estis gastigata. En la komenco mi estis gastigata, en tre bona etoso, de nederlandaj esperantistoj, kiuj poste restadis en mia hejmo. Pro diversaj kialoj pasis sufiĉe longa periodo, dum kiu mi ne havis kontaktojn kun esperantistoj - nur koresponde. Mi transloĝigis kaj trovis E-grupon. Mi denove akceptis esperantistojn alilandajn, nur unu tagon, ĉar ili ankaŭ vizitis la grupon. Pasintjare, mi aliĝis al la Amikeca Reto kaj ricevis plurajn leterojn el Pollando, precipe de gejunuloj, kiuj petas labori sur la vitkampoj, kiujn ni kultivas. Sed, bedaŭrinde, la maŝinoj anstataŭas la personojn, kaj mi ne povas promesi laboron. Estas dumvintre precipe, ke ni havas pli da laboro permana, kaj oni petas laboron dum somero. Aliparte, mi ne povos gastigi tiom da personoj. Necesus elekti!...

Nun mi devos modifi la tekston de la Amikeca Reto.

Mi pli konsciis ĉi-jare pri la malfacilaĵoj, kiam oni devas veturigi la gaston, ĉar mi ne povas bone stiri aŭton, do mia edzo faras tion (sed ne ĉiam bonvole), des pli ke li ne parolas esperanton...

Kiel skribis Nicole kaj Jacqueline, oni devus precizigi la kondiĉojn de la gastigado. Tiamaniere la gasto kaj la gastiganto havas perspektivon por fruktodona renkonto.

Sabine

P.S. Mi aldonas kelkajn liniojn. Pasintjare, nederlanda korespondanto venis kun sia edzino kaj gebofratoj (kiuj ne parolas Esperanton). Mi gastigis ilin, sed post kelkaj tagoj mi devis diri, ke ni estas invitataj ĉe kuzoj!

Ĉi-jare, kiam ili skribis por reveni, mi diris, ke ili bonvolos prepari mem la manĝaĵojn. Ili do preparis la nutraĵon en la ruldomo. Ni donis legomojn el nia ĝardeno, kaj ni invitis unu la aliajn nur por manĝi kukojn.

SUPERSIGNOJ

Antaŭ kelkaj jaroj, ĉe mia laborejo, la komputero kaj la teksttrakta programo TEXTOR ebligis min supersigni la esperantajn literojn. Nun ni havas PC-aparatojn kun ne multkolora ekrano kaj la sama programo adaptita por ili ne ebligas tiun lokadon krom sur la francajn literojn kuintime ĉapelitajn.

Prizorgante bultenon, mi provis meti ilin antaŭ la literojn "a ĵoj", opiniante, ke tio estas bone legebla (eĉ se ne korekta, pli legebla ol la aldono de h... "ajhoj").

Ĵanseb, kiun mi renkontis, ege sperta komputisto, diris al mi, ke li pli ŝatas aldoni elidilon (ĉar la cirkumfleksa supersigno komputere havas apartan sencon). Sed lia uzo de apudlokita " ' " firmigis min je mia uzo antaŭ la literoj kiel li.

Ĝis iu tago, kiam mia korektanto havis subitan ideon korekti la tutan bultenon viŝante la apudsidajn supersignojn, skribile remetante ilin sur la taŭgajn literojn kaj lasante truojn, pli malfaciligantajn la legadon, mia opinio.

Do mi reiris la penan kaj ne modernan uzon : maŝin-skribis sen supersignoj (post longa peno por alkitimiĝi maŝin-skribi rapide rekte kun supersignoj) kaj mane aldonis la supersignojn.

Plie, nun mi posedas la porlernan disketon de Christian Bertin, kiu ne taŭgas por la mia kaj la laborejaj komputeroj, ĉar ili ne havas taŭgajn plurkolorajn ekranojn.

Mi revas etan programeron, kiun mi povus legigi de mia aparato antaŭ la legado de la porteksta programo kaj kiu ŝanĝus kelkajn neuzitajn signojn (literajn aŭ matematikajn) en verajn esperantajn supersignitajn literojn, kiuj monkas al mi.

Ĉu spertaj ge-laŭtuloj povus konsili min aŭ eĉ sendi al mi taŭgan programeron (eĉ surpaperran)?

TEREZA

(Tereza Sabatier, 21 rue Pasteur, F-94490 ORMESSON)

PRI LA PRINCIPO DE NECESO KAJ SUFIĈO

Unuaj reagoj pri la respondoj

(L:84, p.42,43,46)

Mi unue volas danki Valo, ET Grimley Evans kaj André Gilles, kiuj reagis al miaj artikoloj (L:83, p.27-29).

* Al Valo, kiu demandas sin, kial Zamenhof ne adoptis la neŝanĝeblecon de la adjektivoj, mi trovis la kialon (post la redaktado de miaj artikoloj) en la tiel interesa libro de Pierre Janton: "Esperanto, lingvo, literaturo, movado," p.43 kaj 73.

Zamenhof mem proponis forigon de la akuzativo, la neŝanĝeblajn adjektivojn kaj pliajn aliajn reformojn. Kiel vera demokrato, li submetis la projektojn de reformoj al la opinio de la unuaj esperantistoj. Mi citas: "157 balotintoj rifuzis ĉiujn ŝanĝojn, 93 deziris ŝanĝetojn, 14 postulis gravajn ŝanĝojn. Zamenhof akceptis la verdikton, kvankam multaj abonantoj sendis al li balotilon, por ke li uzu ĝin laŭplaĉe, li ne eluzis tiun okazon por trudi sian propran opinion al la esperantistaro. Li detenis sin de la voĉdono." Domaĝe, ĉar ni havus eble pli simplan lingvon kaj eble la movado evitus la ido-skismon?

* ET. Grimley Evans levis demandon de la prononcado. Grava kaj interesa temo, kiu estas malfacile solvebla, kiam oni scias, ke la naciaj lingvoj estas malsame prononcataj de unu loko al alia.

Jes, mi proponas, ke oni devus diri : "Ĉi tie ni povas citi Victor (viktora) Hugo". Por mi la N estas superflua ĉar ne povas ekzisti dubo (V.H. ne povas citi nin).

La frazo "La oficiro anstataŭis la gardiston" tia, kia ĝi estas, estas dusenca kaj ne komplete.

- 1) La oficiro anstataŭis la gardiston per alia soldato.
2. La oficiro mem anstataŭis la gardiston. Laŭ mi, 1 kaj 2 estas pli precizaj ol la uzo de "anstataŭi" kaj "anstataŭigi".

* Mi permesas al mi rimarkigi al André Gilles, ke la francaj vortoj, kiujn li citis : "goethéen, dantesque, shakespearien" ne plu estas propraj nomoj.

Mi bedaŭras, ke Zamenhof sin lasis influi de la novbakitaj esperantistoj. Li estis tamen multe pli kompetenta ol ili! Konklude, mi devas apliki regulojn, kiujn mi konsideras kiel neadekvatajn, same kiel en la franca lingvo, kiam mi devas skribi multe tro da neutilaj literoj, se mi ne volas aspekti kiel malklerulo!

La libro de P. Janton meritas, ke oni pli funde esploru kelkajn ideojn de la verkisto. Mi esperas, ke nia ĉiam aktiva "maljunulo" nun tute resaniĝis.

RAYHALL (Rejal)

LA AKUZATIVO : ĈU SENUTILA MALFACILAĴO ?

Homoj, al kiuj mankas talento por lerni fremdajn lingvojn, emas kredi, ke la reguloj de ilia gepatra lingvo esprimas nur la plej naturan pensmanieron de la homaro, dum la gramatikaj reguloj de fremdaj lingvoj estas senbezone komplikaj kaj malfacilaj.

Mi memoras pri jena anekdoto : lam en Esperantenkontiĝo francoj plendis antaŭ mi, kompreneble krokodile, ke la helpverbo por la konjugacio en Esperanto estas "esti" kaj ne "havi". Mi diris al ili (krokodile!) ke tio ŝajnas al mi pli logika, kaj ke la helpverbo de la pola lingvo estas "esti". Reago : "anstataŭ favori la polojn,

Zamenhof devus iom pensi pri la francoj".

Homoj, kies lingvoj preskaŭ ne havas deklinaciojn, imagas, ke deklinacioj estas terura komplikado, el kiu internacia lingvo devus liberigi. Tial kelkaj francaj esperantistoj volas rezigni pri la akuzativo. Tiu propono tute ne estas nova en la historio de Esperanto.

Tiuj francoj tute ne konscias, ke la preskaŭan neeston de deklinacioj en la franca lingvo la franca gramatiko kompensas per tre rigoraj reguloj pri la loko de vortoj en frazoj. En Esperanto eblas diri :

kato manĝas muson - muson manĝas kato - manĝas kato muson - manĝas muson kato - kato muson manĝas muson kato manĝas

Ĉiuj 6 frazoj estas egale ĝustaj. Sed en franca lingvo eblas diri nur : kato manĝas muso.

Se oni diras : muso manĝas kato, oni diras la malon de tio, kion oni volis esprimi. La 4 aliaj frazoj simple estas malkompreneblaj en la franca lingvo.

Kompreneble, malbona franca esperantisto ĉiam diras : "kato manĝas muson", ignorante la 5 aliajn eblojn konstrui la saman frazon, aŭ opiniante, ke ili estas malnaturaj.

Sed ĉu vere por ĉiuj homoj el ĉiuj nacioj estas pli facile inter 6 eblaj frazoj rekoni la ununuran, kiun permesas konstrui la gramatikaj reguloj de iu lingvo, ol kompreni, kio estas akuzativo?

La deŝoranta poligloto
Jakelino

DISFALIS OBSTINA BARO

9an de novembro. Subite eksplodis novaĵo ankoraŭ neatendita : la "Muro de la Honto", kiu dum jardekoj dividis la du germanajn popolojn, estas simbole kaj oficiale nuligita; de nun la Berlinanoj povas libere ĝin trapasi. Grandega evento, komparebla kun la kupto kaj detruo de la Bastilo. Ducent jarojn poste, Berlino egaligis al Parizo. Per siaj grandiozaj pacaj manifestacioj, la Berlinanoj faligis la obstinan baron.

En tiu afero estas io rimarkinda : la homoj ambaŭflanke

de la muro parolas saman lingvon. Simila fenomeno okazis antaŭ duonjarcento, kiam efektiviĝis la "Anschluss" de Aŭstrio al Germanio. Mi aŭdis per radio la Vienan amason saluti la eniron de Hitler per la moto : "Ein Volk, ein Reich, ein Führer" (Unu popolo, unu regno, unu gvidisto).

Vi vidas, al kio mi celas : se ĉiuj popoloj havus unu komunan lingvon... Unu homaro, unu lingvo!

Sed mi aŭdas la advokaton de la diablo flustri : "La Svisoj kun kvar diversaj idiomoj tamen sentas sin unu popolo. Male, la popoloj de Argentino, Ĉilio, Urugvajo, Paragvajo, Bolivio, Peruo, Kolombio, Ekvadoro, Venezuelo, Meksikio kaj la landoj de Centrameriko kun unu sama lingvo estas tamen dividitaj..."

Kion konkludi ? Eble, ke ĉiu demando estas komplika, kaj rezistas al niaj raciaj simpligoj. Tial, ke ni ĉiam emas rezoni pri malmultaj arbitre elektitaj faktoroj, dum endus konsideri multajn diversajn, el kiuj neniu estas neglektinda.

Ni tamen provu akiri klaran komprenon. Por esti unu popolo ne sufiĉas havi unu lingvon. Necesas, plie, havi komunan ideon, komunan idealon. Tial la esperantistoj sin nomas samideanoj. Tial Zamenhof rifuzis konsideri, ke esperanto estas nur lingvo. Li ligis la esperantismon kun homaranismo, kaj Lanti kun sennaciismo, kiu estas esence la sama ismo : ĉar homo estas ano de la homaro sendistinge pri nacioj. La nacioj, artefaritaj entoj, ne havas ekzistokialon. Ili devas malaperi.

VALO

La **GENTA E-GRUPO "La Progreso"** havas la plezuron inviti vin al la Zamenhoffesto, kiu okazos dimanĉon la 17an de decembro 1989 je la 15a h. en la granda salono de la "Dienstencentrum", Braemkasteelstraat, Gentbrugge (apud la naĝejo kaj la policejo : vidu la mapon!)

Programo : festparolado, kanto (M.Keirsebulck), poemoj, komuna kantado, pupteatro, kvizo, skeĉoj, tombolo... Malvarma plado kun granda diverseco : viandaĵoj, legomoj, fruktoj, kafe kaj vino.

Por la (nedevisa) manĝo necesas enskribiĝi. Vegetaranoj bv. kontakti nin. Skribu al: Lödör, Peter Benoitlaan 117, B-9219 Gentbrugge.



Akcidentoj

Septembro 1989.

La gazetoj de Sudfrancio, de Hispanio kaj de Latinameriko raportas kun unuanima emocio pri la gravega akcidento ricevita en la Arleza amfiteatro de la nima taŭristo, la fama matadoro "Nimeño Ila". La taŭro supren levis lin kaj ĵetis lin alten, kaj li falis teren sur la kapo. Rezulto : du kolvertebroj frakasitaj, la mjelo difektita, totala paralizo de la korpo kaj membroj. Nur la cerbo funkcias. La juna viro plenkonscie kaj kuraĝe luktas kontraŭ la morton. La kirurgoj esperas savi lian vivon; sed ĉu iam li povos repreni sian metion, kiu estas lia vivmotiva pasio? Tre dubeble.

Antaŭ kvindekaj aŭ sesdekaj jaroj iel simila akcidento kaŭzis la morton de nia juna kamarado Ozerée. Fortika, vigla, sportema knabo, li plongis en naĝbasenon, kaj lia kapo trafis pilkegon. Rompiĝis la spino ĉe la kolo, kaj tuj sekvis totala paralizo. En plena konscio, ne plu sentante sian korpon, li diris : "Mi estas tuj mortonta". Kaj li mortis, 20-jara. Lia amiko Lanti kaj la tuta SAT-anaro estis profunde afliktitaj de tiu frua morto de plej simpatia kamarado.

Kompare kun tiaj mortigaj batoj de l'sorto, mia vundeto estas vere neatentinda.

Junuloj mortas, aŭ riskas morti. Maljunulo plu vivas. Ofte la vivo estas ja maljusta.

Oktobero 1989.

Al ĉiuj geamikoj, kiuj, informite pri mia akcidento, manifestis simpatian per letero, telefono, aŭ, la plej

proksimaj najbaroj, per vizito, mi esprimas mian elkoran dankon. Vere, en tia cirkonstanco, esperantisto sin sentas en "granda rondo familia".

Mi hontas, ke mi tiel plendis pro banala okazeto, dum tiom da belaj gejunuloj mortas sur la vojoj, aŭ kripliĝas por sia tuta pluekzistado. Sed mi devas konfesi, ke tiuj atestoj pri amikaj sentoj kuraĝigis min, kaj helpas min en mia lukto por resaniĝo.

Sur la vojo al resaniĝo mi progresas malrapide, tre malrapide, sed

Chi va piano va sano,

Chi va sano va lontano.

Ĉu mi vivos "lontanen" (malproksimen)? Ni vidos. Post la itala proverbo mi elvokos nun la anglan formulon: "Wait and see (atendi kaj vidi). Kaj por fini la zamenhofan trilogion :

L'espero, l'obstino kaj la pacienco.

Pripensoj pri bildkarto

Mi ricevis de Kdo Decobert el Paŭo bildokarton bele koloritan, kun foto de Zamenhof-monumento en tiu urbo. Mi esploris tiun foton per lupeo, kaj surprize ekvidis senbarban vizaĝon de juna viro super la nomo de L.L. Zamenhof. Ni ja kutimas je la tradicia portreto de barbulo kun kalva kapo, kiu reprezentas al ni la Majstron. Ni forgesas, ke en 1887, kiam li publikigis sian Unuan libron de la Lingvo Internacia, D-ro Esperanto estis 28-jara.

28-jara! Printempo de la vivo!

Ja certe, esperanto ne estas afero de maljunuloj! Ni iafoje instruas ĝin en kluboj de emeritoj, de triaĝuloj, bone! Sed kion faras ĝenerale tiuj maljunaj lernantoj? Ili krokodile amuziĝas pri la strukturo de la lingvo, kiu aspektas al ili kiel interesa ludo, sed neniam ili fariĝos praktikantoj. Ni prefere instruu junulojn, adoleskantojn, infanojn. Ĉi tiuj probable ne diskutos senfine pri harfendaj subtilaĵoj de la Plena Gramatiko (tro plena, prave diris Lanti), sed ili praktike uzos la lingvon, interparolante en

kunvenoj, renkontoj, vojaĝoj, eĉ se iafoje ne tute "korekte" laŭ la reguloj, ne grave, se nur ili bone interkomprenas. Tiel ili progresos per agrabla laboro sur la grundo, tiel ili akiros kulturon internacian, ĉar nutritan ĉe la fontoj de ĉiuj naciaj kulturoj, kaj sennaciecan, konforme al ilia aspiro al interfratumado trans ĉiuj landlimoj. Tiel ili fariĝos mondcivitanoj, homaranoj, kiel la 28-jara doktoro, hebreo el Litovio loĝanta en Polio, regato de la rusa caro, sed antaŭ ĉio homo, homarano, ekde la infaneco kaj ĝis lia morto 30 jarojn poste, en la funebra etoso de la unua mondmilito. Li estis perdinta harojn kaj ricevinta barbon, sed lia rigardo tra la dikaj okulvitroj restis luma kaj milda, kaj lia koro batis maltrankvile pro la malfeliĉegoj de la homaro. Li estis nur 58-jara, sed la fervora ardo de lia vivo konsumis kaj eluzis lian nefortikan korpon.

Ni, maljunaj kaj junaj esperantistoj, konservu en nia memoro kaj en nia koro la 28-jaran D-ron Esperanto, la 46-jaran parolinton en la solena malferma kunsido de la Bulonja kongreso, la 58-jaran mortinton en Varsovio. Kaj ni ne forgesu : esperanto estas afero de la junularo!

Kaprica memorkapablo

Tiuj legantoj de *Lauite!*, kiuj havis la paciencon legi miajn "Vortojn", povis konstati, ke mi ofte traktas saman temon en apenaŭ variaj formoj. Ili indulgas al tiu sinripetemo, kiu estas komuna manio de maljunuloj. Alia maljunula manio estas la kutimo rakonti pri rememoroj el la kara infaneco. En tiu benita epoko de la vivo la ricevataj impresoj facile kaj profunde stampiĝas en la mola vakso de la freŝa cerbo, kiu longe konservas ilin. Male, en la maljuneco, la rigidiĝintaj neŭronoj malbone akceptas novajn impresojn, kiuj lasas nur supraĵan, malnetan, forfuĝeman spuron.

Kiam mi 12-13-jara eklernis esperanton, mi facile kaj rapide akiris ampleksan vortprovizon, kiun mi neniam forgesis. Nun, kiam mi renkontas iun de mi ankoraŭ nekonatan neologismon, mi serĉas en PIV kaj ĝin trovas - sed

baldaŭ ĝi forflugas el mia memoro.

Kiam en Rejnlando mi eklernis la germanan lingvon, mia instruisto diris al mi: "Lernu ĉiutage po kvin vortoj: tiel vi baldaŭ akiros riĉan vorttrezoron". Mi estis 23-jara. Mi neglektis la konsilon. Nun mi provas apliki ĝin. Vane: post kelkaj tagoj la pene lernitaj vortoj estas forgesitaj. Mi obstinas, sen granda sukceso.

Tial, instruite de propra sperto, mi diras nun al niaj junaj gesamideanoj: Lernu kiel eble plej multe, dum vi junaj estas. Ĉio, kion vi nun lernas, longe restos en via memoro. Legu multe, kaj notu ĉiun vorton de vi nekonatan, kun ĝia signifo kaj ĝia ekvivalento en via gepatra lingvo. Tiel vi progresos ne nur lingve, sed ankaŭ pense. Kiam vi mem atingos mian nunan aĝon, vi ankoraŭ memoros mian konsilon, kaj vi diros: la maljunulo estis prava.

Simple kaj facile

Foje-foje kelkaj legantoj de **Laŭte!** skribas al mi kaj gratulas pri la simpleco de miaj skriboj, facile legeblaj. Kompreneble tiu spontana laŭdo tre plezurigas min. Kelkaj eĉ komparas mian stilon al tiu de Lanti, kio evidente estas troa. Sed ja vere estas, ke mi kiel Lanti ĉiam provas skribi simple kaj facile. Kiel li mi opinias, ke esperanto estas, kaj devas resti lingvo simpla, de ĉiuj facile komprenebla. Tio estis la celo, mirinde atingita, de Zamenhof, kiu faris sian lingvon ne por altnivelaj intelektuloj, sed por simplaj laboristoj kaj por ĉiuj homoj. Ni do evitu subtilaĵojn kaj harfendojn.

Mi ne kontestas al filozofoj kaj poetoj la rajton fari por sia propra uzo riĉan rafinitan vortaron. Sed por ni, kiuj estas nek poetoj nek filozofoj, sufiĉas la zamenhofa Fundamento. Pere de ĝi ni povas esprimi simple klarajn pensojn kaj sentojn: al tiu celo limiĝas nia ambicio. Sed esti de ĉiuj facile komprenata, tio estas ja granda ambicio.

Edgard JAMART :

Feliĉoj kaj malfeliĉoj de l'kristanismo
(laŭ "**Mil jaroj de kristana filozofio**" de Evaldo PAULI)
- daŭrigo -

8.

En la koncilio de Niceo de 325, ĉe la nova ĉefurbo konstruata, difiniĝis la dieco de Jesuo; la oficiala kredo estos do, ke Jesuo estas persono kun du naturoj (la homa kaj la dia), tiel ke la dia naturo apartenu al la persono de la Patro kaj al la persono de Jesuo. En la koncilio de Konstantinopolo de 381 difiniĝas la dieco de la Sankta Spirito; ĝi estos do la tria persono, kunhavanta la dian naturon samtempe kun la Patro kaj la Filo. Tiuj du difinoj donas la definitivon formon al la katolika dogmaro pri la Triunuo. Kontraŭ tiu doktrino rezistis granda parto de la kristanaro, sub la nomo arianismo, kies fondinto Ario (256-336) kontraŭbatalis la ideon pri dieco de Jesuo.

* * *

Naskiĝis sankta Kirilo el Aleksandrio ĉirkaŭ 375, ŝajne en Aleksandrio, kun la avantaĝo esti nevo de patriarko Teofilo; tiu ĉi estis tre influa, ĉar li sukcesis eklogi la patriarkon de Konstantinopolo, Johano Krizostomo, per la sinodo de Cene (403). Ankaŭ Kirilo ĉeestis en tiu sinodo. Fine li anstataŭis sian mortintan onklon en 316.

La Koncilio de Efezo okazis en 431 kontraŭ Nestorio, patriarko de Konstantinopolo (428-431). Nestorio neis la kunigon de la dia naturo kaj homa naturo de Jesuo. Eventuale li ricevis apogon de la imperiestro, kiu dum la Koncilio metis Kirilon en la arestejon por tri monatoj; sed postaj klarigoj fare de aliaj ŝanĝis la opinion de la imperiestro kontraŭ la nestorianojn. Li liberigis Kirilon kaj akceptis la kondamnon de Nestorio, kiu sekve estis eksigita kaj restis en iu monakejo. Tamen la episkopo de Antioko kaj aliaj plu ne konsentis pri la kondamno kaj pri kelkaj aspektoj de la doktrino de Kirilo mem. Pro tio, du jarojn

poste, okazas paciga interveno de la imperiestro kaj de la papo; fine Nestorio estos ekzilita en Arabion (435). Kirilo mortis en 444.

*
* *

Aŭgusteno naskiĝis la 13-an de novembro de 354 en urbo Tagasto (hodiaŭ Souk-Ahras en Alĝerio) proksime de Hipono, en la roma provinco Numidio. Post volupta vivo, li kunloĝas kun virino, de kiu li havas filon - Adeotato (373). Tiun jaron, li fariĝas adepto de la maniĥeismo, je la fino de siaj superaj studoj en Kartago. Li restos en tiu dualismo pri bono kaj malbono, kiel principoj de ĉio, dum siaj 12 sukcesaj jaroj de retorika majstrado. Post konvertiĝo al la kristana eklezio li kontraŭbatalis la maniĥeisman kaj aliajn sektojn, kiel la donatistmon kaj la pelagianismon. Li fariĝis episkopo de Hipono en 396.

La katolika lukto kontraŭ la donatistoj - pli rigoraj pri la sakramentoj - fariĝis perforta. Kvankam tolerema, Aŭgusteno kune kun la aliaj episkopoj petas ŝtatan premon kontraŭ la donatistoj: tiuj ĉi restos definitive laŭleĝe malpermesataj. Pro tiuj okazintaĵoj, Aŭgusteno elvolvas konceptojn pri la oficiala protekto de la religio fare de la ŝtato.

Aŭgusteno mortis en 430; li estis preskaŭ 76-jara. Ankaŭ estis tiam terura okazintaĵo, ĉar Vandaloj sovaĝe dirabis Afrikon ekde 426, kaj ili jam ĉirkaŭprenis la urbon Hipono dum tri monatoj; tie rezistos grafo Bonifaco ĝis la 18-a monato, kiam okazas la definitiva venko de la Vandaloj.

Tiu estis ankaŭ signo, ke granda parto el la laboro de Aŭgusteno perdiĝis. Kelkaj aŭgustenaj monaĥoj elmigros al Eŭropo, kie ili daŭrigos la spiriton de Aŭgusteno. Post kelkaj centjaroj okazos la konkero de Afriko fare de la islamanoj, kaj ĉio estos malfarita.

La kulto al la sanktuloj kreskis ekde la V-a jarcento, kaj Aŭgusteno influis tiun movadon. Li rilatigis la sanktan virgulinon Maria kun la sava ago de Jesuo.

Individuaj devoj laŭ Aŭgusteno konsistas en la obeo al la limoj ene de kiuj povas okazi homaj agoj kaj sentoj. Tiu koncepto pri individua moralo estas pozitive rigida, ĉar ĝi ne permesas la liberan volupton kaj scivolon. Devoj pri la aliaj komenciĝas per la respekto je alia vivo ekde la naskiĝo ene de la utero. Tiutempe stoikistoj kaj juristoj konsideris la feton tutaĵe kiel parton de la virino.

Aŭgusteno ankaŭ ne sukcesis percepti la bonon de la seksa amo kaj de la familio. Li asertis, ke sklaveco estas kontraŭ la homa naturo, sed ĝi povas okazi kiel sekvo de milito. Dio permesas la sklavecon ankaŭ pro la pekoj; sklaveco estas do antaŭvidata institucio.

La ĝenerala historio ricevis de Aŭgusteno la alnoton, per scienca indukto, ke bonuloj kaj malbonuloj estas en ĉiama kontraŭbatalo. Li montras precipe, ke la civito de Dio kaj la civito de la demono interbatalas; ekzemplo de tio estas la religiaj persekutoj.

Bedaŭrinde, tamen, la epoko de Aŭgusteno estas tiu, kiam oni komencis la detruadon de la paganaj temploj, sen atenti ilian artan aspekton, precipe de la statuoj kaj pentraĵoj. Tiu perforta detruo de la paganismo okazis precipe dum la regado de Teodozio la Granda (379-395), la lasta samtempa imperiestro de Oriento kaj Okcidento; li malpermesis paganajn kultojn en 381 kaj olimpiajn ludojn en 394.

9.

La kortego de la Okcidenta Kristana Romia Imperio ennestiĝis en Raveno en 404. La interna nekompetenteco de tiu imperio kaj la kreskanta ekstera premo de novaj germandevenaj nacioj (nomataj barbaraj) rezultas en ĝeneralan disfalon de la okcidenta civilizacio, kvankam kreskas la eklezia influo rilate la ŝtaton. La kristana penso iĝis pli kaj pli dogmeca. La teologio fariĝis preskaŭ kiel juro, serĉanta pozitivan apogon sur la biblian ekzegezon kaj la tradiciajn doktrinojn.

Patro Krizologo (403-450), brila oratoro kaj episkopo

en Raveno asertas, ke la filozofio estas invento de diablo. Li estis konsiderata sanktulo kaj la papo en 1729 lin deklaris en la listo de la oficialaj doktoroj de la katolika eklezio.

La papo sankta Leono I-a, la Granda, estris de 440 ĝis 461. Li kreis per praktikaj rimedoj kaj doktrino la unuecon de la eklezio, en Okcidento kaj en Oriento, kun efika apogo de la imperiestroj.

Li sukcesis havigi kontraŭ la herezulojn novajn leĝojn. Tiutempe la maniĥeoj disvastigis en Italio, precipe ĉar multaj venis el Afriko post la invado de la Vandaloj; la papo decidis la bruligon de iliaj libroj kaj arestis multajn pere de la ŝtata povo; cetere, la liberaj moroj de la maniĥeoj estis kondamnitaj kiel malmoralaj. Kun tiu ĝis nun plej signifa papo, la katolika eklezio sukcesis akiri sian definitivan formon. Sekve, li restis tre diskuta nomo, laŭ la vidpunkto, en kiu la scienca esploristo situas: katolikoj gloras lin kiel "la Granda"; aliaj mallaŭdas lin kiel homon uzintan ruzecon kaj perforton.

10.

La romia imperio translokis sian ĉefurbon en 330 p.K. al Bizancio, sub la nova nomo Konstantinopolo (hodiaŭ Istambulo), per decido de imperiestro Konstanteno la Granda. En tiu strategia situo la imperia ĉefurbo sukcesis rezisti ĝis 1453, dum la tuta mezepoko. En Okcidento la malfacilaĵoj kreskis. Teodozio dividas la imperion en 395. La novaj popoloj - la barbaroj - de tempo al tempo invadas la Okcidentan imperion, kiu falis definitive en 476. La bizancaj imperiestroj influis en Italio kaj foje ili provis la rekonkeron kaj reunuiĝon de la imperio, sed vane.

Kiel la barbaroj en Okcidento, tiel la araboj en Oriento detruos pli kaj pli la imperion de Konstantinopolo. La disdividitaj arabaj triboj de la dezerto unuiĝis sub la influo de profeto Mahometo (570-632), aŭtoro de la Korano, la sankta libro de lia nova religio. Rezulte de la nova araba spirito, aliaj regnoj estos fonditaj ĉirkaŭ Konstantinopolo.

La menciitaj ŝanĝoj havis kiel restaĵojn tri politikajn kaj kulturajn mondojn - la bizancan, la okcidenteŭropan, la araban. Rilate la kristanismon, ĝi daŭris mezepoke en Bizancio kaj ĝis modernepoke en okcidenta Eŭropo, sed ne kun la antaŭa sama aspekto.

La novaj popoloj venintaj el la sovaĝaj arbaroj en la Okcidentan Romian Imperion, rapide evoluis pro influo de la antaŭa socio. Tiu relativa evoluo estas tamen mal-evoluo, se ni konsideras la dekadencan situacion de la romia civilizacio.

Aliflanke, ĉe la primitiva homo tre valoras la religiaj celoj. Pro tio, la kristana eklezio, kiu jam venas organizita el la romia imperio, sukcesas influu la novajn popolojn. Efektive, la ekleziuloj pozitive kontribuis al la kolektiva plibonigo de la sociaj kaj kulturaj kondiĉoj en tiu nova okcidenta Eŭropo.

Tamen, samtempe la romia eklezio provas pli kaj pli starigi teokration. Dum la tuta mezepoko ni vidos la lukton inter la politika povo de la princoj kaj la roma eklezio.

La kristanigo de la novaj popoloj komenciĝis antaŭ la definitiva fiksiĝo, dum ili estis ankoraŭ en la balkanaj regionoj kaj dum ili fluis en okcidentan direkton.

La Visigotoj, kiam ili alvenis al Italio, estis arianaj kristanoj, jam kristanigitaj en Oriento, pere de grekaj arianoj. En Hispanio, la Visigotoj forlasis la arianismon nur dum la katolika regado de Rekaredo (586-601).

Kiam la Lombardoj invadas Italion en 568, kelkaj kvankam tre malmultaj, jam estas kristanoj. Kreskas la kristanismo dum la regado de Aŭtari (584-590), kies edzino Teodolina estis katolika. Poste aperas du arianaj reĝoj. Grimoaldo (663-671) kompletigas la kristanigon de la Lombardoj. Tiu popolo perdos tamen la sendependecon pro la papo mem. Dum la Lombardoj provas etendi sian influon sur la tutan Italion, la papo Gregorio III venigis en 756 Pepinon, la francan reĝon, kiu garantiis la kreskeman politikan povon de la papo per la kreo de la Pontifika Stato. En 774, Karlo

Granda kompletigas la konkeron de la lombarda Italio. Sekve li estos kronata en 800 en Romo, kiel Imperiestro de la Sankta Kristana Imperio de Okcidento. Nur en 1870, kiam Germanio venkas Francion, la Lombardoj fine reunuigos Italion.

En Francio la Burgundoj okupis la valon de Rono (ĉefurbo Dijono) en 476, kaj restas tie kaj ankaŭ tuj adoptas la kristanisman. En 534 ili estos submetataj de la Frankoj.

La Frankoj mem, kiuj invadis la nun tiel nomatan Francion, dum la regado de Klodoveo (481-511) kristaniĝos post la batalo de Tolbiako en 496, kontraŭ la Alamoj; Klodoveo ricevis la kristanan bapton samtempe kun siaj soldatoj.

La kristanigo de Anglio kaj Germanio fariĝos pli malrapide.

(daŭrigota)

ĈESU FUMI TUJ

1. Ĉesu fumi, kamarado. Provu vivi sen fumado.
Ĉu bonsane aŭ plezure sin mem toksis senmezure?
Do forĵetu vi fumadon, ĉesu fumi tuj.
Nefumado via sano - ĉesu fumi tuj.
2. Ŝatas ege vi, ĉarmulo, rigardi en virinokuloj.
Se vi blovos nikotinson, vin evitos la virino.
Do forĵetu...
3. Vi, virino rave bela kun okuloj blue helaj.
Sed el via buŝ' vaporas nikotino fiodora. Do forĵetu...
4. Dum vi ridas, nigraj dentoj vekas antipatisentojn,
Ĉar toksas fumo via naturan vivmedion. Do forĵetu...
5. Dum vi fumas, ĉiuj ĝemas, nerv' streĉiĝas, koro tremas.
Sed vi ne interesiĝas, ke aliaj malsaniĝas. Do forĵetu...
6. Jam pensiro vin turmentas, ronkas vi dum nokt' silentas.
Tedas tuso bruston vian. Liberiĝu, kara mia. Do forĵetu.
7. Bonprosperon ŝatu vere, kaj fumadon ne preferu.
Survizaĝa flavkoloro ne allogos la sinjorojn. Do forĵetu.
8. Veneniĝas eĉ etuloj; bluaj ombroj sub okuloj,
Verdo kovras ties vangojn, tion ne forigos lango. Do forĵetu.

9. Multe kostas cigaredoj, se neglektos vi rimedon.
Baldaŭ via mon' degelos, kaj kancero sanon ŝtelos.
Do forĵetu.

D-ro Teresa Jankowska, el Varsovio.

Panaĭt ISTRATI

Dum la somera renkontiĝo, loka ano de la asocio "Les Amis de Panaĭt Istrati" (la Amikoj de Panaĭt Istrati) prezentis al la ĉeestantaro diversajn informojn pri la vivo kaj verkaro de tiu rumandevena sed franclingva verkisto.

Panaĭt ISTRATI naskiĝis en Braĭla (Rumanio) en 1884. Lia patrino estis tuklavistino kaj lia patro, kiun li neniam konis, greka kontrabandisto. Kiam 12-jara, li forlasis la hejmon de sia patrino kaj foriris vagadi tra la mondo. Li travojaĝis Egiption, Sirion, Libanon, Grekion, Italion, Francion... praktikante ĉiujn laborojn laŭ la hazardo de la okazaĵoj. Kelnero en trinkejo, kukisto, mekanikisto, dokisto, domfarbisto, fotografo, ktp... Li partoprenis en la revolucia movado de la dokistoj en Braĭla sed ĉiam rifuzis la dogmon de politika partio.

Li konis la mizeron, la malesperon, provis sin mortigi en Nico, kie li konatiĝis kun Romain Rolland. Li lernis aŭtodidakte la francan lingvon, kiu estas la lingvo de lia preskaŭ tuta verkaro konsistanta el :

1. La vivo de Adrien Zografi, aŭtobiografio, en kiu li rakontas sian aventureman vivon.
2. La rakontoj de Adrien Zografi, plenaj de la koloroj kaj de la vigleco de Oriento.
3. Atestoj, i.a. tri libroj pri Sovetio, kiun li vizitis en 1929, logita de la "alia flamo". Li revenis elrevigita, rapide vidinte, ke la revolucio estis perfidita. Li raportis objektivite pri la faktoj. Tiam li estis forlasita kaj kalumniata fare de la stalinistoj.

Panaĭt ISTRATI mortis pro ftizo en 1935. Li estis talenta verkisto kaj vera amanto de la libereco, "la homo, kiu aliĝis al nenio" !

Longatempe la verkoj de P.I. estis netroveblaj. Pro tio li estas malbone konata. Nun la tuta verkaro estas reel-donita en la franca ĉe jenaj eldonejoj :

"Vie et récits d'Adrien Zografi", Folio n°1592, 1494, 1253, 1593, 1594, 1266, 1447.

"Vers l'autre flamme" : Folio "Essais" n°57.

"Les Chardons du Baragan" : Les Cahiers Rouges", Grasset
Asocio: Les Amis de Panaït Istrati, Christian GOLFETTO
50, rue Baudelaire, F 26000 VALENCE.

De kelkaj jaroj eldonoj de la verkoj de Panaït Istrati aperas en aliaj landoj : Hungario, Nederlando, Grekio, Svisio, Ĉinio, Fed. Germanio, kaj ĉefe Rumanio.

J.G.

Panaït Istrati :

Antaŭparole al "La Domo Thüringer"

... Ĉar estas antaŭ ni, tia kia fetora kadavro, la terura vivo de la homoj - de la intervorantaj homoj. Nu! Ĉu ne veras, ke, de kiam ekzistas la mondo, ĉiu forto leviganta super la homamaso, kaj de kie ajn ĝi devenas, de supre aŭ de malsupre, nur premtretas sian malfortan proksimumon? Nu, kie estas skribite, ke tio nepre pludaŭru tiel ĝis la fino de l'jarcentoj?

Mi scias : kleraj amikoj senĉese memorigas al mi la biologion kaj ties leĝojn. Ne! ne! Se nur tion instruas la Universitatoj, teren la Universitatojn! Mi rifuzas konsideri min kiel rabobirdon nutrantan sin per la sango de siaj samgeneranoj. Mi estas homo, t.e. la nura el la animaloj suferanta, se ĝi vidas la suferon de siaj samuloj. Endas ne konfuzi min kun kompatinda nizo.

Nu? Je kio utilas ĉiuj tiuj sciencoj, ĉiuj tiuj artoj, la tuta sterko de viaj miljaraj filozofioj, se oni ankoraŭ ne sukcesis malpermesi, per mortpuno, vivi per la sango de sia proksimumo? Kial, de sur viaj katedroj pri moralo kaj religio, vi predikas la Belon, la Bonon, la Juston, dum ĉiuj vi, ĝis la lasta, praktike obeas nur la leĝojn de la niza biologio?

Sed ĉiujn tiujn aferojn oni jam diris, kaj tiel bone, ke la homamasoj, ĉiam avidaj je justeco, furore ilin admiras. Kaj el ĉiuj ikonoklastoj ili faris siajn novajn idolojn.

Kio rezultis el tio? Nenio.

Aŭ efektive jes! Rezultis el tio nova metio, la plej abomena: la metio, ja ege lukra, de la artisto aŭ de la moralisto, kiu vivas per la sango de la sankta ribelo de la venkitoj.

Nun tio finiĝu!

Mi vidas naskiĝi sur la strato novan homon, mizerulon. Mizerulo, kiu kredas plu je nenio, sed kiu fidas tute en la fortoj de la vivo. Kaj de sur mia malsanula lito - kiu ĉi-aŭtune povos iĝi mia mort-lito - mi diras al tiu mizerulo, kion Adrien Zografi eble ne plu havos la tempon diri. Al li mi diras jenon :

Post mia fidado al ĉiuj demokratioj, al ĉiuj diktaturoj kaj al ĉiuj sciencoj kaj mia ĉiama seniluziigo, mia lasta espero pri socia justo fiksiĝis sur la artoj kaj la artistoj. Ĉar ili havas grandan influon al la homamasoj, mi esperis, ke aperos en literaturo ribelantaj gigantoj, kiuj ĉiuj, surstrate, ekgvidos la movadon kontraŭ nian bestecan civilizon, senmaskigante ĉiujn hipokritaĵojn : demokratiajn, diktaturajn, religiajn, sciencajn, pacifistajn aŭ moralecajn.

Nenion tian oni vidis, kiel ci scias. La arto estas trompego, same kiel ĉiuj aliaj t.n. valoroj. Ankaŭ mi mem artumis, kaj ne sensukcese, mi do povas diri tion al ci: ankoraŭ trompego. Kaj la artisto similas la ekleziulon: li predikas sublimon, sed stakigas plejeble da ormoneroj, forlasas cin en la lupfaŭko kaj retirigas por skrapmordi sian kaŝmonon, perfekte defendata ĝuste per tiuj maŝinpafiloj, kiujn detruu li petas de ci, de ci sola.

Jen kio estas la artoj kaj la artistoj, kiuj emocias cin. Ĉarlatoj!

Tial, kiam de sia rifuĝejo ili instigas cin aliĝi al tio kaj al tio ĉi, larmante pri cia sorto, aliĝu plu al nenio. Eĉ ne al ĉiuj tiuj "Internaciaj Patrioj", kiuj laŭmodas en ĉi tiu jarcento.

Patrioj? Teren ĉiuj patrioj, naciaj aŭ internaciaj, kun ties malnovaj aŭ novaj mastroj, demokratioj aŭ absolutistoj,

ĉiuj mastroj - teren ĉiuj patrioj, kiuj ĉiam mortigas unujn por ke vivu la aliaj. Rifuzu mortaĉi por neniu ajn. Krucu la brakojn! Ĉion sabotu! Restu pezega per cia tuta pezo. Diru al tiuj ĉi sinjoroj, kiaj ajn ili estas, ke ili iru mem mortigi sin por ĉiuj tiuj patrioj, kiujn ĉiun jarcenton ili el-pensas kaj kiuj ĉiuj similas unu la aliajn. Ci, nuda homo, homo kiu posedas nur ciajn mizerajn brakojn aŭ mizeran kapon, forrifuzu cin al ĉio, al ĉio : tiel al iliaj ideoj kiel al ilia tekniko; al iliaj artoj kiel al ilia komforta ribelo.

Kaj se ci iam ekemos tamen al iu aŭ al io, mortigu cin por ĉiesulino, por hundo de amiko aŭ por pigro.

Vivu la homo, kiu aliĝas al nenio!

(esp-igis : Kribo)

Lina GABRIELLI :

LA HOMOJ, NE LA BESTOJ, FARIS "AUSCHWITZ"

Antaŭ nelonge la itala televido prezentis la filmon "Oferbuĉo" dum ok vesperoj, kaj la personoj multe parolis pri tio, kun diversaj opiniroj kaj konsideroj. La filmo nenion novan diris al mi; nenion, kion mi ne jam sciis. Sed la kortuŝo, la impreso, kiun mi sentis, ne estis malpli vivaj. Kaj kiam mi iris al la termobanejo de Acquasanta, en provinco de Ascoli Piceno, kaj mi troviĝis inter viroj kaj virinoj kune atendantaj la kotbanojn, la sulfurbanojn kaj la masaĝojn, kovritaj per banroboj kaj kun viŝilo sur la kolo, ia naŭzo kaptis min, ĉar la bildoj de la filmo miksiĝas kun tiu ĉi realeco kaj ŝajnas al mi retrovi en la malgranda popolamaso, ĉirkaŭ mi, la personojn, kiuj per la falsa preteksto de la duŝo, devis morti en la gaskameroj.

La filmo "Oferbuĉo" aŭ "oferbruligo", mi ripetas, nenion novan diris al mi, nenion kion mi jam ne sciis. Fakte mi vizitis unu el tiuj ekstermejoj, nome Auschwitz-Birchnau (Oswiencim en pola lingvo) kaj mi ne nur vizitis tiun ekstermejon, mi tradukis el Esperanto en la italan lingvon ĝian gvidlibron por la italaj vizitantoj, laŭ peto de mia pola amikino, jam studentino en la universitato por eksterlandanoj en Perugia. Ŝi diris al mi, ke se mi faros tiun ĉi tradukon por ŝi, ŝi havos gravan avantaĝon por sia estonteco. En tiu tempo, en la jaro 1970, mi ne fartis bone, pro tio la traduko pli deprimis min; eble ĝi estigis la malesperon, kiu turmentadis

min kaj kontraŭ kiu mi reagis per ĉiuj miaj fortoj. Mi devis gutumi la vortojn priskribintajn terurajn okazintaĵojn por redoni ilin en mian lingvon. Sed mi ne rezignis, ĉar mi volis absolute helpi mian amikino.

Mi estas kiel hejme en Pollando. Pollando estas mia dua patrujo. Tamen mi multe hezitis antaŭ ol eniri en Auschwitz(n). Mi konsentis paŝi tien nur ĉar grupo de geamikoj volis viziti ĝin; kaj mi, kiu ne sciis ankoraŭ ŝofori, ne emis resti longajn horojn en la aŭtomobilo parkita antaŭ la enirpordo de la koncentrejo, nun Muzeo, por atendi ilian revenon.

Mi metis do miajn piedojn en Auschwitz malgraŭ mia neŝato, sed mi ne bedaŭras pro tio; male, mi revizitis la lokon la duan, la trian fojon. Mi komprenas, ke ni ne devas turni la kapon kun preteksto, ke la vero malkvietigas nin. Ni devas scii, eĉ se la vero tro pezas, por ke tio ĉi ne reokazu. Sufiĉe granda kvanto da homoj ankoraŭ ne sciis (kaj tio ĉi ne estas justu por tiuj, kiuj estis masakritaj) kaj nun ili surpriziĝas, eĉ ne kredas.

Vizitante Auschwitz, mi trovis ĉion, kion mi gutumis, vorton post vorto, en la Esperanto-Gvidlibro, kaj ĉion, kion mi vidis en la dokumentoj donitaj al mi de iu pola doktoro, en la jaro 1959, kiam la unuan fojon mi vizitis Varsovion, okaze de la 59a U.K. de UEA. Trairante la kadraron, kie paŝis la malliberuloj por iri al la laboro, kun supre skribita la mokaĵo : "LA LABORO IGAS VIN LIBERAJ", miaj kruroj ligniĝis kaj mi antaŭeniris peze. Krom tio ĉi mi havis la impreson, ke mi ne estas sola, ke la malliberuloj lacaj senlime svarmas ĉirkaŭ mi, sin apogante unu al la alia por ne riski novan selektadon, kiu kondukos la plej malfortajn al la morto.

Pro la granda silento, eĉ ŝajnis al mi percepti la voĉojn de tiuj malbonŝancaj kreitaĵoj, kiuj kulpis pri nenio, aŭ pri niaj samaj pekoj, tamen tragike apartenantaj al raso, al patrio, aŭ al medio, kiujn la barbareco de taĉmento da frenezaj monstroj volis ekstermi. "Kial?", mi demandis min. "Dio, kie vi estis?", mi kriis interne de mi. La samajn demandojn faras la homoj, kiuj vidis la filmon. Tamen "Oferbruligo" montras nur etan parton de tio, kio okazis. Kaj ne Dio, eĉ ne bestoj, faris la ekstermejon. Nur la homoj.

La duan fojon, kiam mi vizitis Auschwitz(n), miaj geamikoj sidis ĉe la kafejo situanta apud la enirejo de la Muzeo. Mi volis nenion gustumi. Ne eblas gustumi ion ajn, por refreŝiĝi aŭ sensoifigi min post la vizito

al loko, kie superregis la krueleco kaj la angoro. Sed mi aĉetis memor-igan poŝtmarkon kaj albumon kun la fotoj de la ekstermejo. lama mal-liberulo, nun vendisto ĉe la butikoj de la Muzeo, subskribis tiun albumon.

La originalon de la gvidlibro al la Ŝtata Muzeo de Auschwitz-Birch-
nau verkis Kazimiro Smolen. Tiu ĉi gvidilo havas en la unua paĝo frag-
menton (malfermiĝas per fragmento) de la versoj de malliberulo N.6524,
nome de R. Stakowski, verkitaj en junio 1942: "... la truo de la ĉenoj
kaj la voĉo de la malliberejo. Leviĝas el la ombroj la Doloro, la Mal-
espero, la Ribelo kaj la Falo. Mi staras por iri senforta al la ekstrema
turmento kun la griza uniformo de la karcero."

La ordo konstrui la ekstermejon de Auschwitz-Birch-
nau okazis en aprilo 1940. Rudolf Hess estis la ĉefo. La hitleranoj direktis la unuan
transportadon de polaj malliberuloj al la "Konzentrationslager Auschwitz"
la 14an de junio 1940.

Hodiaŭ la dezertaj gardturoj kun siaj mitraloj ne plu timigas; oni ne
plu aŭdas la kralvokojn de la gardistoj, la bruon de la botoj de la al-
ternantaj sentineloj, oni ne plu vidas vagadi milionojn da malliberuloj
ĉiam pli malgrasaj, kun la striita kaptiteja vestaĵo. Malpleniĝis la barako,
kie troviĝis la sidejo de la estro de la kampo kaj la sidejo de la devigaj
laboroj, de la cenzuro de la leteroj kaj de la kolekto de la novaj al-
venintoj. Sed plu vivas la betulo, kiu kreskis ĉe la enirejo, kie la kapt-
itoj haltis surmetante por la lasta fojo siajn vestaĵojn kaj kie ili ankoraŭ
havis siajn proprajn nomojn. Antaŭ tiu betulo paŝis dekoj da miloj da
viroj kaj virinoj. De tie ili transiris la pikdraton.

Ne ekzistas nur la lokoj de la martiro. Ekzistas ankaŭ la skribitaj
atestoj. La kuracisto de SS, Johan Kremer, kiu ĉeestis persone en la
selektado, skribis en sia memorkajero :

"Je la tria de la mateno mi partoprenis la unuan fojon en la aktiv-
ado. Kompare kun ĝi la infero de Dante estas nur komedio. Vespere,
preskaŭ je la 20a horo, mi partoprenis denove en la selektado. La per-
sonaro de SS ĉeestis en ĝi, ĉar tiu selektado ricevis unu kvinonon de
litro da alkoholo, kvin cigaredojn, unu hektogramon da kolbaso kaj unu
panegon".

Rudolf Hess skribis ankaŭ ĉi tion :

"Antaŭ la fino de la somero 1942, ni ekcindrigis la kadavrojn sur
ligno en brulejo, poste ni elterigis la kadavrojn, kiuj estis en la ŝton-
minejoj. Ni surverŝis ilin per brulaĵo. Je la fino de la jaro ni sukcesis

malpleniĝi la grandajn tombojn, kiuj entenis sepcent mil korpojn."

La gaskameroj kaj la kremacifornoj venis post la pafadoj kaj la brul-
igoj sur la amaso de lignaĵoj. La homojn de SS naŭzis la sango, kiu el-
fluis el la pafadoj antaŭ la muro de la morto, kelkajn paŝojn for de la
ĉambreto, kie pereis Pastro Maksimiliano Kolbe. Tiuj homoj alvokis pli
puran sistemon kaj pli rapidan, por ke la stomako ne suferu kaj por ke
ili ne laciĝu pro la troa laboro. Pro tio estis akceptita la "Ciclone B".

Pereis pastroj kaj homoj apartenantaj al diversaj konfesioj, al diversaj
sociaj medioj kaj profesioj; pereis sanuloj kaj malsanuloj, maljunuloj kaj
infanoj, intelektaj komunistoj kaj Ciganoj; pereis precipe Judoj.

Nuntempe estas, kiu kredas kaj konsternite sin demandas pri la kialo
de tioma krueleco; kaj estas, kiu ne kredas kaj konsideras "Oferbruligo"
mensogo de la usonanoj. Estas malfacile kredi, sed oni ne povas nei ver-
aĵon tiel evidentan. Bedaŭrinde, la ekstermkampoj ekzistis. Mi eklaŭtigis
mian voĉon en la Justica Palaco de mia urbo, iun tagon, kiam mi tie
troviĝis, al juna advokato, ĉar ŝi parolis pri dolĉaĉa usona inventaĵo.
Mi laŭtigis mian voĉon por diri, ke Auschwitz(n) mi vidis per miaj pro-
praj okuloj.

En la oficejo de Radio Varsovio, samideano demandis min pri kio
mi sentis vidante Auschwitz. Mi diris, inter aliaĵoj, ke la pendigilo terur-
igas min; tamen kiam mi vidis pendigilon flanke de kremaciejo kaj mi
sciis, ke per ĝi oni mortigis Hess, mia reago estis ne antaŭvidebla: mi
komencis salti kaj bati la manojn: "La justico estas ankaŭ venĝo", diris
doktoro Ettore Toffoletto el Bologna, kiam mi rakontis ĉi tion al li.
Hess ploris kaj petegis por la savigo de sia vivo, li, kiu mortigis milojn
da homoj!

Estas poezio, kiu resumas la judan tragedion: "Li, la judo, fermis la
kofron kaj premis niajn manojn. Tro malfrue mi komprenis lian miron ĉe
la konstato, ke ni, la kristanoj, lasis lin iri. Li ekmarŝis al Auschwitz
por morti tie. Nun niaj gefiloj kreskis. Lia filo volas scii, mia filo ne
scios kion respondi. Sed vi kaj mi scias, ke ni permesis al li foriri."

*En Laŭte 84 restis ellasita la adreso de ARGENTINA E-
INSTITUTO : San Carlos 1755, RA-1676 SANTOS LUGARES
(B.A.) al kiu eblas mendi la 4 novajn broŝurojn de Ergoto
de Bonaero : 1. Karakole, karambole! 2. La Ergoto de
Ergoto. 3. Ergotado, versumado! 4. Tambur-eño
(je 5 IRKoj ĉiu ekz.)*

Erich Fried
tradukis Hagen Hirte

VI

Tie kie ne estas libero
vi estas la libero
Tie kie ne estas digno
vi estas la digno
Tie kie ne estas varmo
neniu proksimo inter homo kaj homo
vi estas la proksimo kaj varmo
koro de la senkora mondo

Viaj lipoj kaj via lango
estas demandoj kaj respondo
En viaj brakoj kaj en via sino
estas io kiel trankvilo
Ĉiu devis iri for de vi
aliras al la ĝisreveno
Vi estas komenco de la futuro
koro de la senkora mondo


Vi ne estas kredoparagrafo
kaj ne filozofio
neniu reglamento kaj ne posedo
je kiu oni kroĉas sin
Vi estas vivanta homo
vi estas virino
kaj vi povas erari kaj dubi kaj esti bona
koro de la senkora mondo

III SEN ALUMETOJ

Ĉio
kio ŝajnigas
kvazaŭ mi perdis ĝin
kolektiĝas sekrete
kaj ordigas sin
tute per si mem
al domo
kun aranĝitaj ĉambroj

Jam odoras je pano
en la kuirejo
En la varma lito retroĵetas
vi vere vi
nuda la litkovrilon
kaj etendas al mi
dum la ekloĝo
du vivantajn brakojn.

Michèle Freud :



AL PORPACA BIRDO

Ekflugu, mia blanka kolombo
Kun la olivarba branĉeto
En cia lumega beko!
Svebu, mia dolĉulineto
Super la neĝaj montpintoj,
La smeraldaj lagoj, la koloraj kampoj,
Super la vilaĝoj, urbegoj,
Kaj la teruraj batalterenoj
Por alporti al la tuta homaro
La feliĉigan pacmesaĝon!

Ĉu ci ne vidas la mondon
Vekiĝi kiel rozo sub la sunradioj?
Ĉu ci ne aŭdas l'esperigan amehon
Kiu respondas al ĉiu susuro
De ciaz silkaj flugiloj,
Al ciaz ĝojgaj rukuloj?

Porpaca birdo, neniam mortu.
Flugu, senĉese flugu
Ĝis la homo rehomigu!

Londono, la 13-an de oktobro 1989.

Neatendita restado

Mi duonkuŝas sur mia lito. Fronte al mi estas alia lito kun iu en ĝi. Mi vidas nur piedfingrojn kaj iom de lia brako. Supozeble nur viroj kuŝas en tiu ĉambro. Verda kaj fleksebla tubo lin ligas al aparato fiksita ĉe la muro. Mi alkuraĝas suprenlevi la kapon por vidi en kiu parto de li finiĝas la tubo. Versajne la buŝo aŭ la nazo. Afiŝeto pendanta sur la litapogilo indikas "Nil by mouth". Laŭ la kunteksto kaj mia kompreno de la angla, tio signifas, ke oni ne nutru lin per la buŝo. Ŝajnas, ke li ĵus vekigis kaj nun iom moviĝas. Tiel mi povas observi lian vizaĝon. Li estas sufiĉe juna kaj liphara. Flegistino alparolas lin, li respondas nur per etaj kapmovoj kaj gorgbruoj. Maldekstre de li ĵus stariĝis alia flegato ĉirkaŭ 60-jaraĝa. Alispeca tubo ligas lian manon al plasta travidebla poŝo plena je likvo, versajne nutraĵo. La poŝo estas alkroĉita al surrada pendumilo, tiel li povas promeni kuntrenante sian ekipaĵon. Mia maldekstra najbaro aspektas tute sana kaj dekstre de mi alia lito momente malplena de altstatura junulo ankaŭ ligita al surrada pendumilo. La ĉambro entenas 6 litojn kun 5 malsanuloj. Alia ĉambro, kiu estas duonapartigita de la mia same aspektas. Pro la vasteco kaj la aranĝo de la litoj, ĝi aspektas iom kiel la hospitalaj dormejoj, kiujn mi vidis en filmoj. Kvankam mi ĵus alvenis sen ia entuziasmo, ŝajnas, ke mi jam alkitimiĝas al la loko kaj ĝia etoso. Iel mia ĉeesto ĉi tie havas pozitivajn flankojn. Ĝi estas nova kaj ne atendita sperto. Ĝi krome ebligas al mi legi kaj skribi. Al **Laŭte** mi dediĉas miajn unuajn momentojn.

Mi restos 3 tagojn ĉi tie, eble pli. Tio dependos parte de la specialisto, kiu esploros morgaŭ miajn makzelojn. Ĉu li decidis operacii min aŭ ne.

Hodiaŭ estis tre malagrabla tago. Iuj ne mirus pri tiu fakto, ĉar estas vendredo la 13-a. Mi surprize vekigis preskaŭ sen doloro. Maldolorigaj kuraciloj efikis dum la nokto. Tiel mi decidis iri al mia laborejo kiel kutime kaj

tion mi faris. Laŭ sugesto de mia kunulino mi tamen petis konsultadon kun kuracisto en la kuraco-centro, telefonante de mia laborejo. Troigante mian akcidenteton, mi sukcesis havigi al mi konsultadon fine de la mateno. Mi do vizitis mian kuraciston. Post kelkminuta esploro tuŝa kaj demanda ŝi saĝe decidis sendi min al la hospitalo por pli detala konsultado. Kvankam ŝi ne multe komentis mian staton, ŝi min provizis per longa letero sigelgluita, destinita al la hospitalo. Iom grumble pro la perdita tempo mi min direktis al la hospitalo, kie mi perdis horojn en atendado, radiografiado, konsultadoj. Mi tiel maltrafis la tagmanĝon. Finfine jugoslava kuracistino, kiu cetere ne multe pli bone regas la anglan ol mi, klarigis ke iu osto ne troviĝas en la ĝusta loko, aldonante ke ĝi estas versajne rompita, kvankam tio ne videblas sur la radiografioj. Pro tio mi devos enhospitaliĝi dum almenaŭ 3 tagoj por observado, ricevi antibiotikojn fortadoze kaj eble esti operaciata. Necesis ĉirkaŭ unu minuto por digesti tiun novaĵon. Fakte mi ne havis alian elektelecon ol submetiĝi. Mi tamen petis kelkajn horojn da libertempo por reiri hejmen, informi mian amikinon kaj preni personajn aferojn. Al tio mia kontraŭulino rebatis, ke mi povas facile telefoni de la hospitalo kaj ke ili havas ĉion necesan por mia restado. Feliĉe mi ne havas telefonaparaton en mia hejmo kaj ili ne havas la 2 lastajn numerojn de **Laŭte**, kiujn mi apenaŭ tralegis. Tiuj argumentoj fine efikis kaj tio permesis al mi 2-horan eskapon. Forirante, mia kuracistino, kiu tute ne fidis min, aldonis ke mi plene respondecos, se mi decidus ne reveni.

Mi kompreneble revenis, iom depremita, sufiĉe frue por ne ricevi la grumblojn de la flegistinoj, tro malfrue por trafi la vespermanĝon.

Kvankam mi ne havas statistikojn, mi kvazaŭ certas, ke karateo malpli danĝeras ol aliaj sportoj kiel futbalo - mi cetere havis artikdoloron ĉe mia dekstra piedo lastsomere ludante futbalon... Tamen okazas foje akcidentoj en karateo kaj unu min trafis hieraŭ vespere. Dum ekzercado mi estis piedbatita ĉe la vizaĝo fare de freŝbakita

praktikanto. Mi tuj sciis, ke io ne plu tute enordas. Tamen miaj dentoj ne rompiĝis, sango ne aperis kaj nenio difekta videblis. Mi simple reiris hejmen pli frue.

Sabate matene.

Vekiĝo je la 6.30, la flegoj komenciĝas. Miakaze ili ĉefe konsistas en antibiotika injekto, ne en la postaĵo kiel mi spertis en Francio plurfoje dum mia infanaĝo sed en vejno de mia brako. Fleksebla kaj maldika tubo restas konstante en mia vejno. Ĝia ekstera ekstremo fiksiĝas al alia pli dika tubo kun ŝtopilo. La tuto restas ĉe la brako per simpla glubendo. Per tiu sistemo mi suferis nek la nadlon nek la antibiotikon. Mi devas ankaŭ kontroli mian temperaturon enmetante la termometron ne en la pugtruon sed en la buŝon. Mi konstatas, ke mia dekstra najbaro ne povas paroli kaj ke la aliflanka ne bone aŭdas. Ŝajnas, ke mi ne elektis la plej taŭgan lokon por praktiki mian anglan. Mi malsategas, mi ricevis neniun manĝon de 24 horoj.

Dimanĉvespere.

Krom unu flegato ĉiuj aliaj akceptis vizitantojn. Tiu, iom maldekstre kaj fronte al mi, verŝajne Italo, estis ĉirkaŭita de 9 personoj antaŭ kelkaj minutoj. Mi eĉ ne plu povis lin vidi en tiu amaso. Kvankam la babilado estis vigla kaj senhalta, mi opinias ilin ne tro bruaj por Italoj. Eble ili iel angliĝis pro tro longa restado en tiu lando. Mia fronta najbaro ne ricevis viziton de post mia alveno - jam 48 horojn. Lia stato bone progresis. Li iom parolas, trinkas, ekmanĝas ne tro solidan nutraĵon kaj faras nenion alian ol sidi aŭ plej ofte kuŝi. Mia maldekstra apudulo afablas sed tedas min per malspritaĵoj - plej ofte nekomprenablaj - ŝercoj. Hieraŭ matene li promesis "bacon, sausages and black pudding" (lardo, kolbaso, sangokolbaso) por la matenmanĝo kaj tio kompreneble ne okazis. Tiumatene li rediris sian ŝercon kaj mem ridis pri ĝi. La Italo daŭre ĝemas kaj grimacas pro stomakdoloroj kaj plendas pri ne sufiĉa atento de la flegistinoj. Plej malagrabra malsanulo estas maljuna novalvenanto de la apuda ĉambro, kiu senhalte alvokas la kuracistinojn kaj foje laŭte kantas. Tio iom distris la aliajn je la komenco kaj ĉiujn tedas nun.

Mia dekstrulo ŝajnas la plej simpatia kaj trankvila flegato. Li skribas kaj legas tuttage. Ĉar li ne retrovis la paroluzon, mi ne kuraĝas alparoli lin.

Ĝis nun mi ne aŭdis la anglan akcenton inter la aro da kuracistoj, flegistinoj kaj purigistinoj. Preskaŭ ĉiuj estas nigrhaŭtuloj kaj Hindoj. Jen kiel disvolviĝas tago ĉi tie. 6.30. Flegoj kaj teo. 8.00. Matenmanĝo. 10.00. Kafaŭzo (mi ne scias, ĉu mi trafe elektis la vorton "paŭzo"...). 12.00. Flegoj kaj tagmanĝo. 15.00. Temomento (jam pli konvena vorto). 17.30. Flegoj kaj vespermanĝo. 21.00 Flegoj kaj teo. Teo krome estas trinkebla post ĉiu manĝo. Mia restado ĉi tie estas finfine sufiĉe agraba, preskaŭ feria. Ĝi kostos al mi nenion. Sinjorino Thatcher ankoraŭ ne sukcesis sendependigi tiun servon de la ŝtato. Mia sinteno rilate al la flegado kaj ĉiuj zorgoj, kiujn mi ricevis estas tute pozitiva. Mi ĉefe ĝojas, ke mi ne bezonis enviciĝi por ricevi liton en tiu hospitalo. Oktobro estas ja trankvila monato.

En mia loĝejo, la 18-an de oktobro.

Mi forlasis la hospitalon lunde, kun komprenebla plezuro. Iom pli frue ol mi, foriris ankaŭ mia dekstra najbaro. Li mirakle retrovis la paroluzon. Unuafoje mi aŭdis lian voĉon, kiam li varme adiaŭis min francalingve.

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

- Kiuj landoj, venkitaj en la lasta mondmilito, dum multaj jaroj ne rajtis havi armeojn nek fabriki armilojn?
- Japanio kaj Germanio.
- Nun, 45 jarojn poste, kiuj landoj estas plej prosperaj kaj ekonomie plej potencaj en la mondo?
- Japanio kaj Germanio.

Senkomente.

VALO

laŭta informoj kaj petoj

ZAMENHOF, BILDRAKONTE...

1987 estis la jubilea jaro por la tuta esperanta popolo. Ankaŭ mi intencis festi ĝin laŭ miaj propraj fortoj kaj gustoj. Kiucele? Pli bone diskonigi la vivon de Ludoviko Lazaro Zamenhof, en la diversaj landoj, ĉar li estas, kompreneble! multe tro malbone kaj ne sufiĉe konata.

Al kiuj publikoj? Unue, al la gejunulaj esperantistoj, precipe, due, al la neesperantistoj, esperante ke multaj reprezentantoj el diversaj landoj prenos la decidon ĝin traduki tra sia propra nacia lingvo.

Sub kiu prezento? Sub la formo de bildstrio, de bildrakonto. La tasko ne estis tre facila... la "propra lingvo" de bildstrio tute malsimilas al tiu de kutima romano, ekzemple, kiu estas nur skriba, aŭ de la kina, bilda kaj aŭdebla; ĉar fakte, la plej grandan parton de sia laboro Zamenhof faris sidante kaj cerbumante! Tio ne estas facile "transbildebla".

Tamen, post multaj klopodoj, korektoj, mi finis tiun scenarion, tre feliĉa pro ĝi...

La sekvantaj etapoj estis : trovi bonan desegniston, eldonanton, presiston kaj respondeculon pri la financaj aferoj (pago de la desegnisto, de la presisto...) Tiuj ĉi etapoj terure malfacile disvolviĝis, kaj daŭris longan

tempon. Mi ofte devis rezigni pri aferoj, kiujn mi ne tute aprobis. Pli ol unu fojon mi estis preta forlasi ĉion, ĉar ludi la rolon de perantino inter 4 diversaj personoj loĝantaj en malproksimaj lokoj unu de la alia estis preskaŭ neeltenebla. Post longa, obstina, paciencega laboro trijara, fine naskiĝis la bebo : bildrakonto pri la Vivo de nia komuna amiko: Zamenhof. Sufiĉe malperfekta, sed tamen: vivanta!

Dank'al tiu "aventuro" mi malkovris, en mia propra korpo, menso kaj animo, kelkajn el la multnombraj propraj malfacilaĵoj, timoj, problemoj, renkontitaj de Zamenhof mem! Mi estas certa pri tio! Nu, mi lin komprenas pli bone!

Krome, la helpo, la subteno de kelkaj gesamideanoj - precipe morala - helpis min.

Dank'al mia belga amiko Jean-Marc Derzelle ekzistas la franca versio* ; ĉina samideano tradukis ĝin en la ĉinan lingvon ; ĉeĥa junulo verkas nuntempe la ĉeĥan version...

Jen mi esperas, ke okazas nun nur la komenco de la sekvanta etapo, por pli bona disvastigo de la Vivo de zamenhof, bildrakonte, tra la tuta mondo!

Tute samideane, Gilenjo **Tilleux**

Adreso : S-ino G. TILLEUX, Hauts de Meuse, 4
B-5101 ERPENT, Belgio

* La lastajn ekzemplerojn, jam, vi povas mendi al :
S-ro J.M. DERZELLE, Hauts de Meuse, 10
B-5101 ERPENT Prezo: 200 belgaj frankoj (+ transportkostoj)
poŝtkonto : 000-096 8225-68

ANONCETO : Antaŭ du jaroj mi aĉetis por mia filo francan komputilon MO5-Thomson. Mankas nur por mi diversaj programoj, "cartridge", kased-programoj, ktp. Mi volonte aĉetus diversajn ludojn, ŝakludojn por mia komputilo. Ĝi estas preskaŭ nekonata en Pollando kaj la programoj estas neakireblaj.
Waldemar Gasior, Skrytka 1610, PL-50 205 WROCLAW 17, Pollando

1990 : Jaro de Paco

La 29an, 30an, 31an de decembro 1989 en Jerusalemo:
Agadi por la Paco kun la Izraeloj kaj la Palestinoj

La Franca-Palestina medicina Asocio subtenas la iniciaton "Agadi por la Paco kun la Izraeloj kaj la Palestinoj" okazanta en Jerusalemo la 29an, 30an kaj 31an de decembro.

La organizantoj esperas, ke milo da personoj venantaj de la tuta Eŭropo, Norda Ameriko kaj aliaj regionoj, kuniĝos kun la Izraeloj kaj la Palestinoj por antaŭenirigi la Pac-celon en spirito de dialogo, kunlaboro kaj neperforto. Tiu iniciato fontas el la 8a Eŭropa Konvencio pri Nuklea malarmado (Vitoria Gasteiz, 6.7/9/1989) kaj aprobita de la eŭropaj kaj internaciaj renkontoj de O.N.G. (neregistaraj asocioj). Patronas ĝin eŭropaj asocioj por la Paco, solidarecaj asocioj kaj O.N.G.

Dum la 3 tagoj okazos diversaj agadoj, renkontoj, diskutoj. Ĉiu agado estos organizita kune kun izraelaj-palestinaj grupoj kaj kompetentaj personoj laŭ spirito de Paco, dialogo kaj kunlaboro surbaze de tri principoj:

du popoloj - du ŝtatoj
respekto al homaj kaj civilaj rajtoj
pactraktado

Ĉiuj asocioj kaj personoj partoprenantaj kaj patronantaj tiun iniciaton aŭ parton de la programo subtenas samajn principojn, eĉ se ili havas aliajn vidpunktojn, politikajn ideologiojn aŭ kulturajn diferencojn.

Nepre neperforta estas la iniciato kaj neperforta devos esti respondo al ĉiuj provokoj. Nerespektanto de tiuj principoj tuj estos taksata kiel fremdulo kaj eĉ oponento de tiu iniciato.

Programo

La ĉefa evento dum la tri tagoj estos homa ĉeno ligonta orientan Jerusalemon al okcidenta Jerusalemo. Antaŭe, devos okazi politikaj kunvenoj, en kiuj eŭropaj, izraelaj, palestinaj eminentuloj prezentos siajn vidpunktojn pri justa, daŭrema Paco, bazitajn sur la supre cititaj tri principoj. Nuntempe ĉi-eventon kune preparas izraelaj kaj palestinaj kompetentaj organizoj kaj reprezentantoj de Eklezioj.

Kvar palestinaj laboristaj virinaj komitatoj kaj la virina movado por paco konsistanta el 13 izraelaj grupoj, organizos unu aŭ plurajn manifestaciojn.

Organizado de 3 forumoj, kies temoj estas : sano, civilaj rajtoj, edukado, preparitaj de izraelaj kaj palestinaj asocioj specialigitaj pri tiuj problemoj.

Dum la tri tagoj estos malfermitaj en okcidenta kaj orienta Jerusalemo : ekspozicioj, spektakloj, bazaroj por lokaj produktoj, vendado de libroj kaj kulturaj politikaj dokumentoj.

Grupe la partoprenantoj vizitos vilaĝojn, tendejojn, sociajn centrojn, palestinajn hospitalojn, izraelajn urbojn disvolviĝantajn, ktp...

Organizado de specifaj renkontoj. Urbestroj, palestinaj infanoj kun ties patronantoj, parlamentanaj grupoj, sindikatoj, kuracistoj, advokatoj, ekleziaj reprezentantoj... renkontos siajn izraelajn aŭ palestinajn samulojn.

Preĝoj kaj aliaj religiaj ceremonioj por Paco estos proponitaj por feriaj tagoj, de la tri religioj reprezentitaj dum tiu jarfina periodo.

esperantigis el A.M.F.P.-informo : G. GABILLON

LA KVINPETALO, internacia stagejo de LF-koop route de Civaux, F-86410 BOURESSE

tel.33.49.428074 P&k Limoges 2408 62 H

- 13/18 Aprilo. Trejnado al konversacio. Prezento de E-kulturo. Organizata ĉefe por la perkorespondaj lernantoj.
- 5/8. Majo Okaze de la kvinjariĝo de la Kvinpetalo : "Internacia Literatura Forumo : Omaĝe al G. Waringhien - prelege sed ne elkatedre". Bonvolu peti la specialan programon.
- 5/10. Julio Staĝo por la perkorespondaj gelernantoj.
- 12/17. Julio Preparado al la skriba parto de Pedagogia Ekzameno kaj Altaj Studoj. Gvidantoj : J.Thierry, G. Lagrange, A.Gilles.
- 19/24. Julio Formado de progresigaj instruistoj - preparado al la parola parto de Kapableco kaj Pedagogia Ekzameno.
- 2/6. Aŭgusto Tradukstaĝo : literaturaj verkoj. Gvid.: G. Lagrange.
- 7/13. Aŭgust.Konatiĝo kun regiono Poitou: formado de ĉiĉeronoj.
- 14/18. Aŭgusto Formado de asembleaj respondeculoj : kiel prezidi, protokoli, prepari rezolucion. Gvidanto : G. Silfer
- Aŭtunaj staĝoj (fine de oktobro, komence de novembro) Staĝo por la perkorespondaj gelernantoj.
La E-literaturo inter la du militoj : de Parizo al Buda-peŝto...

Pli detala programo aperos en januaro 1990. Aliĝoj kaj pliaj informoj : Suzanne Bourot, Centre Esperanto, F-86410 Bouresse.

KIU ???

La Broŝurservo, disponanta nun pri nova presrimedo (**Aŭgusto la Dua!**) kaj pli da spaco en la muelejo de "Cargue Sac", refunkcias. Jam amasiĝis tirkeste multaj manuskriptoj kaj plu alvenas novaj, sed la sendintoj eble ne bone komprenas, ke ne sufiĉas havi presmaŝinon por decidi ion eldoni. Almenaŭ tri demandoj antaŭe leviĝas :

- Kiu pagu la eldonkostojn ? Kiu zorgu pri la disvendado ? kaj ĉefe : Kiu legos la eldonaĵojn ??? (= ĉu ekzistas sufiĉa interesataro?)

Por 1989 aperis jam "**Kie brulas, ĝentlemanoj?**" poemaro de Ch. Bukowski (KB, 20 FF) kaj nun disponeblas : "**Kancero kaj Ekologio**" de Maurice TOUCHAIS, en trad. de kdo Laval (KA, prezo: 15 FF). Tiujn broŝurojn la abonantaro de la BS baldaŭ ricevos. Poste estas projektita la eldonado de :

"**Por tutmonda civitismo**" de A. Gaymard-Rollet (mendo de la Mondcivitana Movado)
- "**Kvardek paŝetoj al plua posedo**", legolibro por francoj, kompilita de kdo Lentaigne.

De la plimultiĝo de la interesataro dependas ja la estonta prospero de tiu servo.

Kribo.

"Aŭgusto la Dua"

Por pagi la novan presilon kaj ties asekuron ni jam ricevis donace 22310 FF (de geamikoj G.F., S.A., P.S., L.L., D.C., M.F., J.C., A.L., A.N.), elprenis 35000 FF el la kaso kaj prunteprenis de Kribo la ceteron. Restas do iom da mono en la kaso, sed... Do, pliaj donacoj estas bonvenaj...

Nia renkontiĝejo "Moulin de Beauville"

iom post iom plibeligiĝas, ricevante multajn vizitojn de helpemuloj. Pliajn informojn vi trovos en la venontaj numeroj!



ALIĜOJ AL L'AMIKECA RETO

Restas nur kelkaj tagoj por aliĝi aŭ realiĝi al nia socivojaĝa servo. Pro presistaj trudoj, la limdato ne estos prokrastita : 31an de decembro (dato de ricevo).

Niaj membroj atente relegu sian prezenton por eventuale kompletigi ĝin. Vi priatentu la novajn rubrikojn por igi vian prezenton pli alloga. Informoj : Amikeca Reto, République 63 F-37530 AMBOISE tel. 47 57 55 63

SAT-SEMAJNFINO EN AMBOISE

La 10an kaj 11an de marto 1990 okazos SAT-semajnfino en urbo Ambuazo en la konata Luar-valo.

La partoprenantoj ĝuos la aparte unikan situon de la VVF-restadejo sur montpinto en la urbocentro mem.

La restado okazos en komfortaj privataj dometoj je tre favora prezo (125 FF tage).

Ni preparas apartan programon por la infanoj kun filmoj, pupteatraĵoj, kanzonoj kaj diversaj ludoj. Estigos kurso por komencantoj kaj multaj prelegoj, debatoj kaj aktivecoj por la aliaj.

Ni vizitos la urbon kaj "Le Clos-Lucé" la lastan domon de Leonardo da Vinci.

Bona okazo por ni ankaŭ por prepari la SAT-Amikaran kongreson de 1991.

Ĉiuj kunlaboroj estos varme akceptataj. Informas. G. ROLLIN, République 63, F-37530 AMBOISE, tel. 47 57 55 63

"ESPERANTO DE RUEIL" 10-JARA

La Asocio "Esperanto de Rueil" (44 str. Dr. Guionis, F-92500 RUEIL) festos sian dekjarigon dimanĉon 3an de dec. 1989, en la CENTRE DE LOISIRS BELLERIVE, 10 bd. Belle Rive (je 500 m. de la RER-stacio).

La programo estas jena : Matene de la 10a ĝis la 12a, en nia kunveno ni eksponos la historion de la movado en Rueil kaj niajn nunajn agadojn (ekspozicioj, prelegoj en lernejoj CM2 kun la kuragiĝa permeso de la Departementa Inspektoro de la Edukado, niaj kursoj...) Kun vi ni interŝanĝos spertojn. Venu multnombre viaj proponoj, sugestoj, dokumentoj...

Je la 12a, akurate, komuna tagmanĝo, samloke. Prezo : 60 FF. Sin anonci kaj antaŭpagi al pĉk 1 585 24 P Paris (ĉi-supra adreso).

De la 14.30 ĝis la 17.30 : "malfermitaj pordoj sur ESPERANTO". Ĉiaj e-isto el ĉiuj horizontoj, kaj neesperantistoj povos libere diskuti. Anoncoj aperos sur la elektronikaj paneloj, en la gazeto "Courier 92", kies ĵurnalisto priraportos Ebla vizito de la urbestro. Venu kaj venigu gejunulojn. Sep studentoj memlernas en Rueil. Por ili necesas kontakto kun aliaj esperantemuloj junaj.

TUTMONDISTOJ INVITAS...

La Komitato de Organizado de la Unuaj kunsidoj de la Tutmondismo "LA IGANTA MONDO" invitas en urbo TURO (TOURS, regiono de Luar-kasteloj) de la 24a ĝis la 28a de aprilo 1990. Vd. la ĉi-poste represitan afiŝon!

Iniciatitaj de la Mondcivitanoj, tiuj kunsidoj konsistigos tribunon por pridiskuti Pacon, Disvolvigon, Ekologion kaj Demokration. Tiuj kunsidoj deziras esti atesto pri la elmergiĝo el la tutmonda civila socio kontraŭ la ekonomiaj kaj ideologiaj potencoj kaj kontraŭ la ekscesoj de suvereneco de la ŝtatoj. Ili deziras esti ankaŭ katalizilo de la ekkonscio de nia tutmonda civitaneco. Ĉiutage : 8 publikaj prelegoj kaj, de la 18a ĝis la 20a, granda publika debato pri la temo kaj kun la prelegantoj de la tago.

Ni proponas al vi diversajn eblecojn prepari kaj partopreni en tiuj manifestacioj : 1) indikante al ni la koordinatojn de asocioj kaj eminentuloj, kiuj ŝajnas interesiĝi pri tiuj kunsidoj, 2) proponante vian propran intervenon pri unu el la kvar elektitaj temoj, 3) partoprenante al reto de inform-disvastigado, de kiu dependos la sukceso de tiuj kunsidoj.

Bonvolu diri, ĉu vi deziras ricevi ekzemplerojn de la afiŝo kaj la proksimuman nombron da programoj. Menciui en kiu lingvo (F, Esp., A, G, H, I kaj Port.)

4) okupante standon dum tiuj kunsidoj, 5) plej grave : finance partoprenante al la kostoj de la organizado.

De nun aliĝu, skribante al : Komitato de Organizado de la Unuaj Kunsidoj de la Tutmondismo, poŝtfako 0631, F 37006 TOURS Cedex.

(resumis laŭ cirkulero : Kribo)

Ndlr.: Ĉiu laŭtulo povos kontribui al la diskonigo de tiu ĉi invito, uzante la ĉi-dorsflankan afiŝeton. Danko!
SAT-Broŝurservo kontribuos per eldonado de nova broŝuro : "**Por tutmonda civitismo - La necesa civitana edukado**" de Andrée Gaymard-Rollet, komence de 1990

URBODOMO DE TURO
FRANCIO

de la 25a ĝis la 28a de aprilo 1990

unuaj tutmondismaj kunsidoj pri

PACO

DISVOLVIĜO

EKOLOGIO

MONDA DEMOKRATIO

“LA IĜANTA MONDO”

4 TAGOJ POR STREBI AL PLI UNUIGINTA MONDO

dumtage

*Prelegoj,
Diskutoj,
Standoj,
Elmontroj*

**ĉiuvespere de
la 18a ĝis la 19a30**

*Granda Publika Debato
pri la temo
kun la prelegantoj
de la tago*

POR ĈIU INFORMO, ALIĜO, PARTOPRENO-PETO, HOTELA REZERVADO AŬ
ORGANIZADO DE VIA RESTADO

bonvolu adresiĝi al

**Komitato de Organizado de la Unuaj Kunsidoj de la Tutmondismo”, poŝtfako 0631,
37006 TOURS CÉDEX (Francio)**

Taŭta informoj kaj petoj

ESPERANTO PAU-ADOUR PARTOPRENIS EN FOIRO

Sabaton la 7an de oktobro, invitita de la asocio PAU-CANCER, Esperanto Pau-Adour partoprenis per bele ekipita budeto en forumo, kiu grupigis okdekda bonvolemaj asocioj.

Malgraŭ varmet' kaj pluvet', parte per siaj taŭgaj paneloj ĵus revenintaj de ekspozicio en Mont-de-Marsan (Landes), parte per la parolfluo de siaj deĵorantoj ("Kredumino, Sinjorino"), la Esperanto-stando ekkonigis, eĉ perforte, multajn preterpasantojn al la Internacia Lingvo. La plej multo el ili forportis "la Unuan Rendevuon". Sur tiuj folioj stampe montriĝis nomo de librovendejo, kie la "Assimil". Metodo vendiĝas. Afiŝo (en A3-formato) reklamis pri tiu libro.

Nur 1500 personoj vizitis tiun foiron, ĉar en alia parto de la urbo samtempe allogis 4000 interesatojn al brokantaĵoj: la Komunumo de Emmaüs.

Nun niaj fortoj direktiĝas al infanoj kaj instruistoj de elementaj lernejoj; baldaŭ ni estos finpretaj por tiu operacio.

J. Decobert

NOVA POŝTKARTO eldonita de C.E.R.L.

(Centre Esperanto de la Région Lyonnaise, 7, rue Major-Martin, F-69001 LYON)
Multkolora, ĝi prezentas aerostaton kun nomo "ESPERANTO" spektatan de 4 diverskontinentaj homoj. Supre la mencio "Bonan kaj feliĉan novjaron". Bela, okulfrapa!...
Vendoprezo (sendokostoj entenataj):
11 ekz.: 26 FF - 22 ekz.: 48 FF
55 ekz.: 105 FF - 110 ekz.: 175 FF
Mendu al CERL, pĉk 2444 99 H LYON.

KORESPOND-PETO

Mi aĝas 27 jarojn, mi interesiĝas pri turismo, muziko, filozofio kaj ŝako. Mi deziras korespondi kun bonaj amikoj el Francujo

ESPERANTO 44

La E-grupo de Luaro-Atlantiko (F) proponas al vi sian kalendaron pri la semajnfinaĵstagroj, kiuj okazos ĉiun trian monaton: 11an/12an de nov. en La Barre de Monts 10an/11an de februaro en Nantes 2an/3an/4an de junio aŭ en Préfailles aŭ apud Châteaubriant

Por pliaj indikoj skribu al la ĉi-suba adreso: Janine VINCE, "Hejme", rue du docteur Bichat, F 44600 ST NAZAIRE

ESPERANTO ROK-DISKETO

EUROKKA (Esperanto-Rok-Asocio, F 31450 DONNEVILLE) produktas disketon, kiu aperos komence de la j.1990. La disketo enhavas titolojn de du E-rokbandoj, nome: - "AMPLIFIKI" jam fama en Esperantio; la sola Rokbando internacia kaj plurseksa. Amplifiki eldonis unuan kasedon, kiu jam elĉerpigis ("Tute ne gravas") La grupo produktas novan (vi povas mendi ĝin). - "LA ROZMARIJAJ BEBOJ" tute nova E-Rokbando el Tuluzo (F). Amuza kaj simpatica, la grupo entuziasmigas; kelkaj jam konas Jomo, la kantiston de la bando. Kiam li kantas sole, lia scena nomo tiam estas "la Fuginto el Alkatraz".

Malkovru tiujn E-Rok-bandojn, iliajn muzikojn kaj E-tekstojn. Antaŭmendu la disketon, konatigu ĝin kaj donacu ĝin al viaj amikoj. Mendu jam nun malplike ĝin. Prezo: 20 FF por ĉiu ekz. Sendokosto por Francio/Eksterlande ĝis 5 ekz.: 8,10FF/16,50, ĝis 9 ekz.: 12,31., ĝis 19 ekz.: 17,54., ĝis 39 ekz.: 24,88.FF. Por pliaj kvantoj estos pakoj da 30 disketoj.

Sendu ĉekon aŭ poŝtan mandaton al EUROKKA (je la ĉi-supre menciita adreso).

Adam Niedzieln
ul. Okrzei 24/4
PL- 58-501 JELENIA GÓRA
Pollando

**NIA METIEJO ESTAS ESPERANTA ENTREPRENO,
ESPERANTO ESTAS NIA LABORA LINGVO.
NIA DEVIZO :
NI KUNE KLOPODU SERVI PER KAJ POR ESPERANTO,
ANKAŬ POR NIA ENTREPRENO**

En 1989, maje, en ĉina plej granda ekonomia speciala regiono Hainan-provinco (fondita la pasintan jaron, latitudo 18°9' ĝis 20°11' kaj longitude 108°36' ĝis 111°3' kun areo 33,920 kvadrataj kilometroj) ni fondis metiejon de Tongza-a turisma meti- kaj belartaĵo. Nia metiejo estas Esperanta entrepreno, kies estraro kaj laborantoj ĉiuj esperantistiĝis. En la entrepreno ne nur la labora lingvo estas Esperanto, sed oni ankaŭ uzadas Esperanton en siaj produktaĵaj prospektoj.

Nia entrepreno ĉefe funkciigas turism-servon, ĉin-pentraĵon, turismajn meti- kaj belartaĵojn, papili-meti-artajon, kulturan kaj edukon bezonaĵojn, agrikultur-produktaĵojn, la instruadon de E. kaj ĉin-pentraĵo kaj aliaj, komercojn, ktp.

Tongza-urbo de Hainan-provinco, kie nia metiejo situas, estas somerumejo kaj vintrumejo de la suda Ĉinio. La klimato en Tongza estas tre milda. Pura kaj klara Nansheng-rivero kantete fluas tra la urbo, kaj ĉirkaŭ la urbo estas verda Wuzhi-montaro kun densaj primitivaj arbaroj, riĉaj naturaj riĉfontoj kaj multe da bongustaj fruktoj de la azia tropika zono. Nermalproksime de la urbo estas blua kaj pura la suda maro de Ĉinio. Ĉiusezone floroj floras, arboj verdiĝas, mar-vento ventetas, la aero freŝas, la suno brilas, la rivero kantetas kaj papilioj flugas... Samtempe ĉi tie staras multe da luksaj hoteloj kaj gastejoj kaj aliaj vidindaj konstruaĵoj. Cetero la natur-pejzaĝo estas tre-ege pitoreska, ĝuste pro tio, ĝi estas tre agrabla loko, kiu tiom plaĉas al fremdaj turistoj kaj ripozkuracantoj. Samtempe ni liveras gvidon en Esperanto.

La vicmetiejestro estas S-ro Wei Jiyuan, kiu estas fama profesia kaj sperta 25-jara esperantisto el Ŝenŝji-provinco, li estas ankaŭ ŝatanto de ĉin-pentraĵo. Li es-

perantistiĝis en 1984. En 1985, en Pekino, li speciale studadis nian lingvon en Pekina lingva instituto. De 1986-1988 kun la nomoj Wei Ĉi (Wei Chi) aŭ Ŭejĉiĵo li servadis en Xi'an-a E-asocio de ŜENŜJI-provinco kiel profesia esperantisto. Komence de 1989, S-ro Wei foriris el sia naskiĝloko Ŝenŝji-provinco, kaj alvenis al Tongza-urbo de Hainan-provinco. Nune kun la nomo Wei Jiyuan en Hainan-provinca E-asocio S-ro Wei servadas kiel la centra persono. Intertempe de 1985-1989 li multfoje akceptis kaj akompanis multe da eksterlandaj esperantistoj. Samtempe li tre ŝatas korespondadi Esperante kun eksterlandaj amikoj, verkadas kaj tradukadas ankaŭ en Esperanto. Ceterĉ li estas unu el la iniciatintoj de la entrepreno. Nome de la asocio kaj entrepreno li elkore petas, ke oni skribu pri ĉiuj temoj. Fine de la jaro li preparadas okazigi E-ekspozicion en Tongza-urbo por urbanojn varbi al sia E-kurso, tamen E-materialoj tre mankas al ni. Ĝuste pro tio S-ro Wei ŝincere petas, ke oni sendu al li iom da materialoj, antaŭe li dankas vin pro via servo.

Se vi volonte subtenas kaj helpas nin iamaniere aŭ intencas korespondi kun ni pri ĉiuj temoj, ne hezitu skribi al ni. Jen nia adreso en literoj kaj en ĉina lingvo :

S-ro Wei Jiyuan

Tongza-shi lüyou gongyi meishu she,
Hainan-provinco, P.R. Ĉinio

S-ro 魏伯原

通什市旅游工艺美术社
通什市 海南省 中国

Plej bone vi skribu la adreson en la lingvo ĉina sur la koverto al ni. (La aŭtoro de ĉi tiu artikolo estas

S-ro Wei Jiyuan, 02.09.1989.

VIA SITUACIO

Via abono al Laŭte! estas registrita ĝis **dec. 1990**

En via BS/L!-konto

restas :

mankas :

Se vi konsentos, ĉar vi kotizis/donacis al AERA, ni konsideras vin membro de AERA por 1990